



5\*89=134\*

# STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO





## KORESPONDI DEZIROJ ANONCOJ

Kelkajn jarkolektojn de Heroldo, Esperanto (UEA), La Progreso (1918-1935), Esperantista, El Popola Ĉinio, Nuntempa Bulgario kaj aliaj revuoj vendas Z. Hršel, Botanická 28, 602 00 Brno. Detala listo ricevebla lau peto. Intesango obla.

26-jara edzino interesigas pri muziko, literaturo kaj sporto: Bulgario, Veliko Tarnovo - 5000 oblast Lovec ulica "Maria Gabrovska" No 6 vnod B nk 13 Valentina Georgieva Bosnakova

S-ro Vadim Ĉajkin, p.k. 24, Ĉjurupinsk-1, USSR-326520, deziras korespondi pri Orienta kulturo kaj filozofio, jogo, orientaj batalartoj, Wushu-o, kolektas Esp.-filatelistaĵojn, librojn. Respondo garantiata.

Dezirus korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj fraŭlo 30j. Šimaitis Boleslovas R. Švyturio 37, u. Panevėžys, Litovio

Dezirus korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj fraŭlino 17-jara Giedrė Arminaitė Taikos pr. 101-37, Kaunas 233 000, Litovio

Dezirus korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj s-ino 26-jara Vilija Čemnavičienė Černiachovskio 137-403, SU-233 000 Kaunas Litovio

Dezirus korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj f-ino 19-jara Rudytė Ruta, Taikos pr. 27-60, SU-233 000 Kaunas, Litovio

Novfondita Internacia Koresponda Servo "Espero" helpas al vi trovi geamikojn. Dezirantoj sendu jenajn informojn pri vi: personan kaj familian nomojn, agon, sekson, kompletan adreson, korespondtemojn. Indiku kiom da korespondantoj vi deziras. Al la letero aldonu 1 internacian respondokuponon. Skribu al: "Espero", Gleb Malcev, Proletarskaja 71, Ĉjurupinsk, SU-326520, Sovetunio

42-jara edzo kun du knaboj José Carlos 16-jara kaj Daniel 14-jara interesigas pri diversaj temoj: paco, lingvoj, gas-tronomio, interrilatoj inter popoloj,

vivo kaj homoj en ĉiuj landoj, problemoj pri la justica administrado kaj ĝia malrapideco (mi estas prokuristo) ktp. Adreso: Carlos Andreu Socias, Inmaculada Concepcion, 15-2- izda. 28019 Madrid, Espana - Hispanio

Ĉu vi serĉas geamikojn? Ĉu vi volas korespondi?

Sudfrancia PerKoresponda Kurso havas pli ol 100 lernantojn en Francio kaj pli ol 100 en 15 landoj el Afriko. Ni bezonas korespondantojn de iu ajn aĝo por niaj gelernantoj. Bonvolu sendi indilojn de via nomo, aĝo, sekso, hobbio, profesio ktp. al Sudfrancia PerKoresponda Kurso, S/C Claude Cayzac Res, Pic Saint Loup - 171 Grand Mail - 34080 Montpellier, Francio

27-jara bibliotekistino interesigas pri hatha-jogo, fotografado kaj literaturo, ekzercas alpinismon kaj kajaksporton: Eva Zakatek, ul. Kościuszki 4/15, 57-100 Strzelin, Pollando

36-jara teknikisto-mekanikisto interesigas pri Esperanto kaj pri fremdaj lingvoj: Krzysztof Dusik, ul. Goszczynskiego - 22A, PL-34-500 Zakopane, Pollando

Klubo de Pola Esperanto-Asocio en Andrychów volas korespondi kun kluboj dezirantaj serĉi interesajn kaj aktivajn formojn de la Esperanto-laboro, ekz. - intersango de E-libroj, E-revuoj, insignoj, muzikkasetoj ktp., - intersango de turistaj grupoj, - propagando de Esperanto.

Por ni estas gojige ricevi interesajn proponojn. Respondo garantiata. Adreso: Pawel Nowak, str. Włokniarzy 22/36, P.O. Kesto 30, 34-120 Andrychów, Poll.

Sesaklasa lernantino interesigas pri plastiko, kolektas ludilojn, pupojn, ursetojn kaj volus pli bone koni batalojn de Malproksima Oriento. Adreso: Karolina Roscak, Tychlin 13/4, 63-324 Kucaków, Pollando

# Honorigoj al esperantistoj

Elstara ĉeĥa literatura kaj drama verkisto kaj poeto, nacia artisto D-ro František K o ŝ í k atingis 80 jarojn la 16-an de majo 1989. Okaze de tiu ĉi jubileo gratulleterojn de la generala sekretario de CK KPC Miloš Jakeš kaj prezidento de Ĉeĥoslovakio Gustáv Husák transdonis al li ministro de kulturo de ĈSR Milan Kymlička. Gratulleterojn al nacia artisto František Kožík sendis ankaŭ la federacia cefministro Ladislav Adamec kaj la prezidanto de Federacia asembleo de ĈSSR Alois Indra. Gratulleteron al nacia artisto František Kožík, honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, sendis ankaŭ la prezidanto de ĈEA Petr Chrdle.

Al la ĉeĥa kaj Esperanta poeto Jiří Karen, prezidanto de Literatura sekcio de ĈEA, oni atribuis premion de Ĉeĥa Literatura Fonduso pro lia nova poemkolekto "Vaše podlaha, náš strop" (Via planko, nia plafono) la 17-an de majo 1989 en la Klubo de ĉeĥoslovakaj verkistoj en Prago.

Al la interesrondeto de esperantistoj ĉe la Urba Kulturcentro en Kladno la Distrikta Packonsilantaro en Kladno atribuis la honoran titolon "Pacdefendantoj". La estro de la rondeto Jiří Slavík transprenis la honorigon dum la plenkunsido de la Distrikta Packonsilantaro la 20-an de aprilo 1989.

S-anino Milada Hemerková ricevis honoran insignon pro la porpaca laboro de la Distrikta Packonsilantaro en Pardubice okaze de la 40-a datreveno de la ĉeĥoslovaka pacmovado.

S-anino Růžena Vlková ricevis honoran diplomon de la Regiona Komitato de Socialista Asocio de Junularo en České Budějovice pro sia aktiveco kiel funkciulino de la Esperanto-rondeto de la Regiona Domo de Infanoj kaj Junularo.

Honore al la 20-a datreveno de Ĉeĥa Esperanto-Asocio la Centra Komitato de ĈEA en sia plenkunsido la 8-an de aprilo 1989 atribuis la titolon "Honora membro de ĈEA" pro la meritoj pri la disvolvigo de la Esperanto-movado en nia lando al jenaj samideanoj:

D-ro Ing. Ludvík Fritsch, České Budějovice

Drahomír Kočvara, Ostrava

Ing. Jaromír Ěbíček, Havlíčkův Brod

František Sedláček, Hartvíkovice

Adolf Staňura, Havířov.

La honoraj titoloj estis solene transdonitaj dum la solenaĵoj de la Dudekjarigo de ĈEA en Havířov.

# La dua mondmilito kaj Esperanto movado

La unuan de septembro 1939 eksplodis la dua mondmilito, ago, kiu apartenas al la plej nigraj paĝoj de la historio de homaro. Estas ankaŭ devo de ni, esperantistoj, rememori la 50-an datrevenon de tiu okazintaĵo, kiu havis por nia movado tiel gravan signifon. El la historio de la Movado ni scias, ke jam la unua mondmilito /1914-1918/ estis forta bato, kiu ŝokis ĉiun esperantiston kaj kiu estis unu el la faktoroj influantaj malfavore la sanon de D-ro L. L. Zamenhof, aŭtoro de la Lingvo. Malgraŭ tio estis Esperanto agnoskata de interbatalantaj potencoj kaj la Movado povis helpi plifaciligi vivon de multaj homoj suferantaj pro la milito; transprenado de korespondaĵoj inter homoj disigitaj pro milito, interkomprenigado en kaptitejoj k. s.

La dua mondmilito fakte malebligis ĉ tiujn avantaĝojn. Esperanto estis de faŝistoj deklarita kiel "sekreta ilo de komunistoj". En la landoj okupataj de faŝistoj estis Esperanto malpermesita kaj esperantistoj estis ĉiufanke persekutataj. Tuj post kiam faŝistoj penetris en Varsovio, estis arestitaj ĉiuj posteuloj de L. L. Zamenhof kaj multaj el ili pereis en koncentrejoj.

Kompreneble ankaŭ ĉeĥaj esperantistoj tro suferis pro la milito. Ĉeĥoslovaka respubliko estis fakte disbatita jam antaŭ la komenco de la milito, la 15-an de marto 1939. Tiutempe regis Hitler ankaŭ en Aŭstrio, kiun li perforte aligis al la "Tria regno" en marto 1938. Faŝistoj ne niigis ĉion progreseman sur la teritorioj, kiujn ili ekregis. En la jaro 1940 estis likvidita ankaŭ la centro de ĉeĥaj esperantistoj, libro-stoko estis disvendita kaj la ejoj estis malluitaj. La libro "Historio de Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio" de D-ro Kamaryt mencias preskaŭ kvar dekojn de esperantistoj - viktimoj de la milito el la vicoj de ĉeĥa esperantistaro.

Kompreneble, ke estis rompitaĵoj ankaŭ kontaktoj inter unuopaj E-asocioj. Dum militaj jaroj ne okazis universalaĵ kongresoj; la lasta antaŭmilita en 1939, la unua postmilita 1947 - tio estas okjara paŭzo. Sed tuj post la milito komencis esperantistoj denove aktive labori. En la jaro 1947 estis kunvokita de UEA universala kongreso en Bernon /Svisujo/. Kvankam la militaj vundoj ne estis ankoraŭ sanigitaj, ĉeestis 1370 partoprenantoj. Ĉeestis ankaŭ grupo el Ĉeĥoslovakio. Denove komenciĝis aktiva laboro por renovigi nian asocion.

Homoj ofte diskutis, kial povis okazi tiu terura hombucado, kiu pereigis milionojn da homoj. Ĉiu klare sentis, ke lingvaj baroj estis unu el gravaj fenomenoj, ke faŝistoj sukcesis sklavigi grandan parton de Eŭropo. Multaj cerbumis, kion fari, por ke io simila jam neniam ripetigu. En la jaro 1953 ni, esperantistoj, fondis en Aŭstria urbo St. Pölten porpacan E-organizaĵon - Mondpacan Esperantistan Movadon - MEM. Ĉe ĝia

lulilo aktivis multaj niaj membroj en fronto kun s-ano Rudolf Burda el Plzeň.

Hodiaŭ ni povas taksi, ke tio estis ĝusta vojo, plene disponigi nian lingvon al paca movado. Hodiaŭ jam 19 landoj havas MEM-sekciojn. Dum universalaĵ kongresoj estas unu tago nomata "Tago de Paco" kaj estas dediĉata al la solvado de problemoj, kiel ankoraŭ pli aktive certigi, ke atomarmiloj, koncentroj, bombardado ktp. estu tute forigitaj el la vortaro de la homaro.

Nia movado estas de la ekstera publiko alte aprezata ĝuste pro tio, ke ni komencas roli en tutmonda paca movado pli kaj pli gravan rolon.

Paca kunekzistado de homaro, tio estis fakte instigo por D-ro L. L. Zamenhof, ke li kreu internacian lingvon. Per nia paca laboro ni plenumas lian revon.

-PVK-

## Cent jaroj de Esperanto en Ĉeĥio

En la jaro 1987 ni festis cent jarojn de Esperanto. En la jaro 1989 ni eniris en la centan jaron de la Internacia Lingvo Esperanto en nia lando, merite de studento František Vladimír Lorenc.

Laŭ atingeblaj fontoj (B. Raichlová, F. Hájek, Waldomiro Lorenz - la filo) la publika elpaŝo kun Esperanto estis okazonta en la jaro 1889, en Prago (1).

En 1887, estante eminenta gimnaziano ("primus") kaj talenta pri lingvoj, 15-jara Lorenc lernis volapukon kaj instruis ĝin, laŭ atesto de lia amikino kaj lernantino Běla Krapková-Raichlová (2), en la socialista kultura rondeto en la gastejo "U Pětrosů" (strato Pštrossova n-ro 189/16, Praha 1). Pro ciklo de traduk-poeemoj de Lorenc (i.a. el Rukopis zelenohorský) en volapuko ĝia aŭtoro M. Schleyer honorigis lin per diplomo "Poedana" (Poeto) (8). Logante tiam en Kolín li, evidente, veturadis (nur 60 km trajne) por ceesti la pragaĵn kunvenojn. "La societo pagis liajn kostojn", sciigis lia posta brazila bofrato Józef Bieszczađ (1).

Dum la jaro 1889 (la monato nekonata) Lorenc, 17-jara, renkontigis kun ESPERANTO kaj tuj ĝin trastudis, sciante tiutempe jam plurajn lingvojn, precipe orientajn. En la sama jaro li ĉesis instrui volapukon en la menciita kunveno kaj ekprelegis pri la Internacia Lingvo de d-ro Esperanto (2). Samjare, Lorenc verkis la unuan lernolibron por ĉeĥoj (27 presitaj pagoj, inkl. antaŭparolon kaj vortareton) kun la titoloj Úplná učebnice mezinárodní řeči dra Esperanta. - Napsal Fr.V.L. - Plena lernolibro de la lingvo internacia de d-ro Esperanto. - Por Bohemoj skribis Fr.V.L. La lernolibron Lorenc sukcesis eldoni jam en 1890 pro-

prakoste, ĉe la presisto F. Hoblík en Pardubice.

Certaj atestoj dokumentas, ke la supozo, ke Lorenc povis instrui Esperanton en Prago nur en la j. 1891 (3), ĉar nur de tiam li eklogis en la ĉefurbo, estas sangenda. Lorenc ja ne povis instrui volapukon (antaŭ Esperanto) en Prago ekde tiu jaro, 1891, ĉar li ja en 1889 ĉesie kun volapuko, trastudis Esperanton kaj tuj ĝin ekinstruis en Prago! (Dum la redaktado de la "Historio" (3) ne estis konataj iuj indikoj, kiujn mi poste elsondis en Brazilo.)

František Hájek (4), kiu vizitadis kun sia patrino la lecionojn de Lorenc, titolante la kunvenojn "U Pštrosů" "okazejo de la Esperanto-pratempo en nia lando 1889-1899", atestas pri la jaro 1889 (1). En sia letero al mi (1959-05-08): "Ĉe ni en Prago Esperanto havis jam de la jaro 1889 karakteron social-revolucian kun celado al internacia paco."(3)

## xx

Elmigrante en 1893 en Brazilon, Lorenc farigis tie, sub la adaptita nomo Francisco Valdomiro Lorenz, elstara persono de la brazila kulturo. Listo de liaj verkoj enhavas 83 titolojn, kelkaj lokaj kluboj kaj unu eldonejo portas epitetate lian nomon. Li sciis vivofine 104 lingvojn, laŭ la dulingva verko "Esperanto kiel revelacio" (Araras, 1976), en kies foto-aldono troviĝas ankaŭ familianoj de Lorenz, la gepatroj, lokoj Zbyslav kaj D. Feliciano do Sul. La mirindan poliglotecon dokumentas i. a. lia postmorte eldonita (1983) verko "La brazilaj Aruakoj", en Brasí-lia (9).

## xxx

En la jaro 1989 ni rememoru ankaŭ, ke antaŭ 80 jaroj okazis en Pra-go la unua landa Esperanto-kongreso. aranĝita de Centra Asocio Bohema Unio Esperantista - Unie českých esperantistů, kiu fondiĝis en 1907. La kongreson salutis, el la barcelona Universala Kongreso, ec L.L.Zamenhof.

Kaj - fine - kiam aperis la unua (pruvebla) ĉeĥa esperantista ron-deto? Estis en la jaro 1897 Unua laborista Esperanto-rondeto en P ř í - b o r. Ĝi ne estis memstara klubo, estante kurs-rondeto ĉe la social-demokrata partio. En Příbor ekzistas (laŭ A. Sattek) memor-stono kaj ta-bulo pri la historiaĵo (5). - Ĝi estis versaĵne la unua laborista ron-de-to en la Aŭstria monarĥio. Cetere, estis ĉeĥoj, kiuj unuaj propagandis Esperanton en la tiama Aŭstria regno(7).

Jaroslav Mařík

- (1) J.M., Starto 2/1984, p. 9-11, 15-16
- (2) "Esperantista" Praha, 1947, 7, p. 83
- (3) Kamaryt, Historio... 1983, p. 16, 17
- (4) lia nomo en la Enciklopedio de E., p. 531-532
- (5) Starto 1974, 8; 1975,1; 1977,4-5
- (6) kiel (3), p. 16
- (7) Enciklopedio de E., p. 26
- (8) F.V.Lorenc: Z mých vzpomínek, manuskri. 1934
- (9) posedata de la aŭtoro

# 40 JAROJ DE LA PORPACA AGADO

Ĉeĥoslovakia porpaca movado solenas ĉijare sian 40-an jubileon. Ĝi estas ligita kun la Unua Kongreso de Pacbatalantoj, kiu okazis en la 1949, 20.-25. aprilo, en Prago kaj pararele en Parizo. Partoprenis delegitoj el 69 landoj. Ĝi instigis organizitan movadon por konservi la pacon. En nia lando estis fondita ĉefa organizo jam la 7-an de julio. Ĝi nomigis Ĉeĥoslovakia Komitato de Pacbatalantoj. Post la federado, en 1968, fondigis 3 institutoj: la tegmenta - Ĉeĥoslovakia Paca Komitato, kaj du paralelaj - Ĉeĥa kaj Slovaka Packonsilioj. En kadro de ili aktivas multaj civitanaĵ organizadoj, do inter ili ankaŭ nia - Esperanto-pacmovado. Ĝin gvidas porpaca sekcio de ĈEA.

Ke ĝi laboras sisteme kaj zorgeme, pravas la fakto, ke estas regule eldonata la presorgano - do PACO-jurnalo. Por profundigi la laboron inter niaj du frataj asocioj, ĉeĥa kaj slovaka, en la jaro 1988 la redakta laboro transiris en la manojn de niaj slovakaj kolegoj. La porpaca agado mem allogas pli kaj pli la esperantistaron. Kelkaj aferoj estigis jam tradiciaj kaj internaciaj. En JABLONEC nad NISOU realigis jam 16-a porpaca marŝado, la 22-an de aprilo. Ĉijare ĝin partoprenis "nur" ĉ. 200 cestantoj diversagaj, inter ili ĉ. 70 esperantistoj. 13 gastoj alvenis el diversaj urboj el GDR. Ni dankas por ilia ĉeesto, ĉar ili faris la renkontigon "internacia". Iliaj samklubanoj ĝuos la belecon de la pajzaĝo el granda kolora libro, kiun ili ricevis donace. Granda danko de ni ĉiuj apartenas al la organizantoj el EK Jablonec, ĉefe al prof. Hradecký, kiu denove ekkreis placajn diplomojn, medalojn, rememoraĵojn.

La dua regula afero okazis la 25-an de junio, kaj tio estis la pacmarŝo al LEŽÁKY /ĉe Pardubice/. Sed la komitatanoj kunsidis jam la 24-an. Oni povis ĝui ĉi programon:

- je la 14-a horo: solena parolo okaze de la 80-a jubileo de EK ĉe la tombo de d-ro Schulhof,
- post reveno interbabilado kaj poste interesa rakonto pri Pardubice, kun koloraj lumbildoj.

Vi certe demandas, ĉu nia agado ankaŭ estas rimarkata en kadro de la oficialaj institutoj. Jes, ĝi estas jam "kronita". La distrik-taj packonsilioj honorigis per pacitolo ĉi niajn klubojn; rondetojn: MĚLNÍK, BOR u Tachova, PŘÍBRAM, PŘEROV, OSTRAVA /Vítko-vice/, ŠUMPERK, JABLONEC nad Nisou, PRAHA, PARDUBICE-Dukla, Kladno. Ĉi lastan okaze de la menciita jubileo de la 40-a jaro. Same okazis en Pardubice, kie merita aganto, Milada H e m e r k o v á /ano de nia paca sekcio/ ricevis la jubilean medalon de la centra organo - do Ĉeĥoslovakia Paca Komitato. Ni gratulas sincere kaj tre, tre dankas, ke ŝi tiel modele reprezentas nian movadon....

Ni instigas ĉiujn esperantistojn partopreni en ĉi agado laŭ niaj ebloj kaj per tio plenumi la plej noblan homaran etikon.

Margit Turková

# KION NI VIDIS EN MOSKVO

Kiu jam foje estis en Moskvo, apenaŭ unuavide rimarkis en ĉi-jara printempo ion nekutiman. La "perestrojko" ankoraŭ nekontentige plenigis nutraj-vendejojn, ne forigis el la stratanguloj malpuraĵojn, ne ekipis la moskvajn stratojn per allogaj montrofenestroj, eĉ ne instigis iliajn posedantojn almenaŭ lavi la vitron. Nur "la infanoj de Arbato" sangigis, pli precize ili ricevis eblecon publike prezentadi sin kaj siajn ideojn, kaj ili faras tion kun eksterordinara entuziasmo. Sed la moskvanoj certe sangigis - oni havas novajn planojn, nekutiman kuragon, eksterordinaran iniciatemon. Kaj la saman agemon ni trovis inter sovetaĵaj esperantistoj, kiujn ni renkontis dum la 22-a Konsultigo de Esperanto-Asocioj de socialismaj landoj en la tagoj 17a - 22a de aprilo 1989.

Novaj trajtoj respeguligis ankaŭ en la traktadoj de la konsultigo. Ĉio estis aliel: la planitan lokon - Tbilisi - anstataŭis Moskvo. La invitinto al la konsultigo - Asocio de Sovetiaĵaj Esperantistoj - intertempe malaperis kaj la novnaskita Sovetrespublikara Esperanto-Unuigo ne estis ankoraŭ jure agnoskita kaj havis nek ejojn nek financojn por tiel grava kaj kosta arangaĵo. Do, ĉiujn zorgojn kaj financojn prenis sur siajn sultrojn soveta Asocio por amikaj kontaktoj kun fremdaj landoj (SSOD). Ni ĉi tie danku al ĝia oficistino L. Ŝanina, kiu faris plejmulton da laboro kaj la tutan semajnon ofereme laboris kaj plenumis ĉies dezirojn. Sed estis pluaj nekutimaĵoj: la nova vivobolo en Sovetunio naskis novajn organizaĵojn, inter tiuj ankaŭ de esperantistoj. Tial inter la partoprenintoj de la konsultigo estis reprezentanto de jam funkcia Litova Esperanto-Asocio, du reprezentantoj de Fonduso de Esperantistaj Junularaj Arangaĵoj el Moskvo, kiu estis jam oficialigita. Al nekutimaĵoj oni kalkulu ankaŭ la tutsemajnan ceeston de UEA-reprezentantoj, nome la vicprezidanto Y. Umeda kaj la ĝenerala direktoro S. Milojeviĉ. Oni en pasinteco suspektis soc-landajn konsultigojn, ke ili emas subfosi UEA - sed nun la asociaĵaj cefuloj konvinkigis, ke niaj landoj, kvankam kelkfoje pritraktis "tiklajn problemojn", celas firmigon de UEA kaj plialtigon de ĝia prestiĝo. Ja, la socialismaj landoj formas nun la plej nombran parton de la UEA-membraro. Kvankam oni ankoraŭ nun ne povas UEA finance cefapogi, tamen oni devas kun niaj membroj en la tutmonda Esperanto-organizaĵo ciam kalkuli ĉe planado de gravaj UEA-iniciatoj.

La programo de la 22-a Konsultigo estis varia, ne ĉion oni sukcese fintraktis. Sed la aktuala rekomendaro estis kompletigita per kelkaj novaj punktoj, kiujn ni publikigos en la venonta numero.

La longegajn traktadojn buntigis kelkaj aliaj programeroj: ni vizitis eminentan sovetaĵan ĉirkon, vizitis la moskvajn Esperanto-klubojn, rigardis kelkajn moskvajn memorindaĵojn kaj ankaŭ ni ekskursis al la impona historia urbo Zagorsk.

Nia trimembra asocia delegitaro - ing. P. Chrdle, dr. P. Jodasová kaj ing. V. Kočvara revenis kun bonaj kaj esperigaĵaj impresoj el frukto-dona semajna laboro en Moskvo.



# La 67-a kongreso de GEA



De la 13-a ĝis la 15-a de majo okazis en Kronach la 67-a kongreso de Germana Esperanto-Asocio. La inaŭguro de la kongreso okazis en la historia salonego de la malnova urbodomo kaj partoprenis ĝin H. Schneider, la unua urbestro de Kronach, H. Hausmann, la dua urbestro, R. Baum, la membro de la bavaria parlamento por Kronach, D-ro H. Köhler, la membro de landa konsilio kaj kandidato por la Eŭropa parlamento. ĈEA-n reprezentis la unua vicprezidanto de ĈEA Ing. Vlastimil Kočvara kaj la estrarano de ĈEA Ing. Zdeněk Fluhař. Ĉeestis ankaŭ reprezentantino de Hungara Esperanto-Asocio Z. Barcsay.

La ĉefa temo de la kongreso estis: Esperanto - ponto al la orienta Eŭropo. La ĉefajn referaĵojn al la temo havis s-ino E. Bohrmann, honora prezidantino de GEA, kaj D-ro H. Köhler. En plua parto de la kongreso elpaŝis kun referaĵo Ing. Vl. Kočvara; li montris eblajn sferojn de pli proksima kunlaboro inter ĈEA kaj GEA. Post la sciigo, ke niaj stataj organoj kaj ankaŭ la estraro de UEA favore rilatas al la ebleco okazigi la Universalan Kongreson en 1992 en Prago, la kongresanoj tondre aplaudis.

La inaŭguron de la kongreso ĉeestis reprezentantoj de regiona gazetaro (du ĵurnaloj), de la regiona televido kaj radio. Dum la unua tago de la kongreso la loka ĵurnalo Neue Presse - Kronach dediĉis tutan paĝon la informoj pri Esperanto kaj aktivecoj de GEA.

La faka kunsido sabate posttagmeze estis dediĉita al diskutoj pri kunlaboro inter la Esperanto-organizaĵoj de ambaŭ politikaj blokoj en Eŭropo. La diskuto estis afereca kaj malferma kaj ĝi montris la strebon trovi komunan solvon de iuj problemoj. Dum la traktado oni preparis projekton de interkonsento, kiun subskribis ĉiuj ĉeestantaj asocioj kaj post pritrakto en la supraĵ organoj de la asocioj ĝi estos valida.

En la sabata kulturprogramo prezentigis loka folkloro grupo "Dis Rosenberglér" kaj teatra grupo de la junulara sekcio de GEA kun E-lingva teatraĵo de W. Tennessee "Kato sur ardanta ladtegmento", kiun la grupo preparas por la UK en Brighton.

La jarkonferenco pritraktis la agadon de GEA kaj la mastrumadon dum du jaroj kaj elektis novan estraron. Nova prezidanto de GEA farigis D-ro W. Schwanzer el Limburg.

La kongreso diskutis ankaŭ pri la preparata konstruado de hotelo Esperanto en Herzberg/Harz. Temas pri rekonstruo de domo fare de privata esperantisto, kiu fondis malgrandan akcian kompanion por la konstruo kaj funkciado de la hotelo. La dividendoj havos formon de senpagaj "restadtagoj" - oni antaŭvidas 2 "restadtagojn" por 1000 DEM de akcia depozito. La "restadtagoj" estos transigeblaj ankaŭ al esperantistoj ekster FRG.

La 67-an kongreson de GEA partoprenis ĉ. 90 personoj (pro festotagoj kaj samtempa alia E-arango en FRG), ĝi estis bone organizita kaj ĝuis grandan atentemon de oficialaj aŭtoritatuloj. La ĉesto de la reprezentantoj de ĈEA kontribuis al ebleco de bona kunlaboro inter E-organizoj de landoj kun malsama sociordo. (kov)

Germana Esperanto-Asocio, Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Hungara Esperanto-Asocio

#### i n t e r k o n s e n t a s

- ke Esperanto estas taŭga komunikilo por faciligi kontaktojn inter homoj el landoj kun malsamaj sociaj, politikaj kaj ekonomiaj strukturoj. Montrigis, ke nova politika evoluo ebligas pli intensigi la kontaktojn inter la asocioj kaj membroj, ĉar per tio ni kontribuos al reciproka ekkono, respekto kaj fido unu al la alia.
- Kiel unuopajn pasojn Germana Esperanto-Asocio intencas fari kun ĈEA kaj HEA...
  - ... regulan intersanĝon de informoj pri antaŭvidataj arandoj;
  - ... komisiis respondeculojn pri la kontaktoj;
  - ... intersanĝi oficialajn reprezentantojn por difinitaj arandoj de la asocioj;
  - ... stimuli la partoprenadon de membroj en internaciaj kunvenoj;
  - ... organizi vizitojn de fakaj prelegantoj kaj artistoj;
  - ... ampleksigi la partoprenon en turismaj arandoj en la partneraj landoj.

La asocioj konscias, ke tiu ĉi interkonsento estas la unua paso. Ni esperas, ke ĝin sekvos pli kaj pli vasta kunlaboro.

La asocioj post pritraktoj en la estraroj publikigos la tekston en siaj oficialaj organoj.

KRONACH, 13.05.1989

Por la GEA Dr. Wolfgang Schwanzer, Por la ĈEA Ing. Vlastimil Kočvara,  
Por la HEA Barcsay Zsuzsa

(La estraro de ĈEA pritraktis kaj aprobis la interkonsenton la 3-an de junio 1989 en sia regula estrarkunveno en Prago.)

# Seminario de pedagogoj en Poprad

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazigis en IKKS de SEA, Poprad - ĈSSR, la 7-an Internacian Metodikan Seminarion (IMS) en la tagoj 27a - 30a de aprilo 1989.

Kadrotemo: Lingvopedagogiaj aspektoj de la Esperanto-instruado. Ĉeestis 43 gesamideanoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Pollando kaj Vjetnamio.

15 prelegintoj prezentis 19 fakajn prelegojn kaj montris diversajn instruhelpilojn, inkluzive de parolanta komputilo. Post ĉiu prelego oni diskutis, intersangis spertojn, la intereso estis granda.

Kompreneble la partoprenantoj ankaŭ ekskursis en Altaj Tatroj, trarigardis la belan urbon Poprad kaj guis la eminentan prezentadon de s-ro Plaszký, konata pupisto.

Oni povas konstati, ke ĉi-jara IMS estis sukcesa kaj fakte kaj etose.

Prelegprogramo de la seminario:

(H. Štruncová)

1989-04-27

Psikolingvistikaj kialoj de lingvaj interferoj. Kiel trakti kaj preventi erarojn? (Szanser)

Lernolibroj de fremdaj lingvoj. (Šaturová)

Survoje al internacia lerno-libro. (Mac Gill)

Kiel instrui uzadon de dulingva vortaro por konsciigi gelernantojn pri interferoj semantika kaj morfologiaj. (Juhász Magdolna)

Esploro de Esperanta leksiko. Esperanto kiel propedeutiko de aliaj fremdlingvoj. (Ballia)

Kiel mi aplikas en la instruado de Esperanto pere de VIDLING la latentan lingvoscion. (Kereszthegyí)

1989-04-28

Psikolingvistikaj bazoj de receptivaj kaj produktivaj kapabloj. (Szanser)

Tekstoprilaboro en la servo por elformi produktivajn kapablojn. (Barcsay)

Didaktiko estas scienco. (Šatura)

La instruisto kaj la nekonata lernanto psike. (Hradil)

Ĉu Esperanto instruendas? Kiuj lingvoj estas bezonataj? (Barandovská, prezentis Kovács)

Kiujn lingvojn instrui - reformpropono. (Kovács)

1989-04-29/30

Kiel helpas la Esperanto-instruadon la matematika pensmaniero. (Balogh)

Lingva interfero kaj la vortaro. (Koutny)

Komputilaj programoj en Esperanto-instruado. (Bartha)

Kelkaj spertoj pri instruado de Esperanto. (Kopecký)

Lingvopedagogiaj aspektoj al infanoj kompare al plenkreskuloj de interferoj, motivoj k.s. (Szanser)

Esperanto-instruado cele al morala eduko, konkludoj. (Barcsay)

Esperanto en eklezioj kaj Esperanto inter infanoj. (Pospíšil)

## Plua grava paŝo al la pliperfektigo de la terminologia laboro

Ekde la 12-a ĝis la 21-a de junio 1989 okazis en Poprad-Spišská Sobota grava evento, kiu stimulos pluan pliperfektigon de la terminologiaj laboroj en Esperanto. El la iniciato de Terminologia Esperanto-Centro (TEC), nome de s-rino Wera BLANKE, estis okazigita terminologia seminario por organizantoj de terminologiaj laboroj. Slovacia Esperanto-Asocio disponigis al la seminario siajn kunvenejojn kaj tranoktejojn en Poprad-Spišská Sobota kaj la laborantoj de la Asocio sindoneme helpadis en la praktikaj organizaĵaj aferoj. La cefa organizanto de la faka programo kaj gvidanta instruanto estis D-ro Edmund BRENT el la Instituto de la Franca Lingvo (Kanado). Krom li prelegis ankaŭ s-rino Wera BLANKE (GDR), Mg-rino Regina THALLER - reprezentantino de Infoterm el Vieno (Aŭstrio), D-ro Klaus SCHUBERT (Nederlando) kaj Ing. Jan WERNER (ĈS). La partoprenantoj povis ankaŭ sufiĉe trejni praktikan terminologian laboron, cetere intence ne estis akra limo inter la prelegoj, diskutoj kaj ekzerco. Sume ĉeestis 16 fakuloj el 9 landoj, nome: Aŭstralio 1, Aŭstrio 1, Ĉeĥoslovakio 7, FRG 1, Hungario 1, GDR 1, Jugoslavio 2, Kanado 1 kaj Nederlando 1. Oni nur povas bedaŭri, ke la disponeblaj ejoj ne ebligis multe pli grandan nombron da partoprenantoj.

La seminario sufiĉe pruvis, ke estas jam netolerebla diletanta kaj amatoreca alpaso en terminologio, ke fakuloj kiuj okupigas pri la ellaborado de terminaroj kaj vortaroj - kaj pri terminologio generale - devas tion fari sur sufiĉe alta scienca nivelo, kiel veraj terminologiaj fakuloj. Esperantistoj, kiuj ankoraŭ nun arbitre "elpensadas" siajn vortarojn kaj terminarojn, ellaboradas siajn "privatajn" nomenklaturajn proponojn, sen priatenti ekzistantajn tekstojn kaj nomenklaturajn sistemojn, tiuj pli kompromitas Esperanton ol helpas al ĝi. La planeco kaj sistemeco de Esperanto nenium pravigas fari tion, kion neniu kuragus fari en ajna etna lingvo. La seminario estas sendiskute grava stimulo por tio, ke ankaŭ terminologiaj laboroj en Esperanto estu komprenataj kaj farataj kiel serioza scienca procedo. Dezirindas, ke la seminario estu sekvata de pluaj similaj entreprenoj, eventuale en unuopaj landaj Esperanto-Asocioj.

## ni mencias...

La 20an de junio la stata film-institucio Krátký film provprojekciis al invititoj de ĈEA la ĵus finlaboritan mallongan koloran filmon Esperanto znananá naději (Esperanto signifas esperon). Spektakleto vere edifa. La regisoro poste flatis, ke la scenetoj en ĝi estas tiel nature prezentataj, ke profesiaj aktoroj ne kapablus tion.

La esperantistoj estu dankaj al la ministerio de kulturo, kiu finance ebligis la pretigon de la bonguste informfa filmo. La "solena" premiero okazos en Havířov, en aŭgusto, dum la festo de dudek jaroj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

JM

# LA AGADO DE LA JUNULARO

## Konferenco de junulara sekcio

En la bslega cirkauaĵo de la Brno-valbaraĵo okazis ekde la 28-a ĝis la 30-a de aprilo 1989 konferenco de Junulara Sekcio de ĈEA. En la konferenco partoprenis proksimume 50 gejunuloj kaj ankaŭ 2 gastoj - el GDR kaj Bulgario. Por la partoprenantoj organizantoj preparis rican programon - krom alia ankaŭ ŝipveturon, danc- kaj amuzvesperojn.

Solene estis la konferenco inaugurita sabate. D-rino Marie Vančurová prelegis pri aktiveco de la junulara sekcio en la pasinta periodo. La membroj de la elekta komisiono konigis la partoprenantojn pri propono de kandidatlisto por elekto de nova JS-estraro. Per la malpublika elektado estis elektita la nova estraro: ing. Vladimír Dvořák - prezidanto, D-rino Pavla Jodasová - vicprezidanto, Karel Ryšánek - sekretario, Jan Smejkal, ing. Jana Buriánová, Vlasta Piščíková kaj D-ro Petr Šmíd - membroj. La nova estraro persone prezentigis al ĉeestantoj kaj konigis ilin pri planoj por la estonta periodo.

En larĝa diskuto krom alia estis dirite, ke en estonteco estos necese intensigi la kunlaboron kun SAJ (SSM), vojgoficejoj kaj kulturdomoj. Junulara sekcio volas organizi ankaŭ novajn negrandajn arangojn, kompreneble tenante la pli tradiciajn (JuSeTuR, SEJAK, IMUR). Regionaj aktivuloj preparos en ĉiuj regionoj ĉiujare minimume unu renkontigon por la pliperfektigo de lingvaj scioj.

Patronino de junulara sekcio Věra Podhradská almontris eblecojn kunlabori kun ceteraj sekcioj kaj komisionoj de ĈEA, aludis pri preparataj E-gravaĵoj en Ĉeĥoslovakio (IFEF 1991 Brno, UK 1992 Praha).

Ĉiuj partoprenantoj estis kontentaj, nur bedaŭris, ke la vetero estis fakte "aprila", pluveca kaj tre malvarma.

(Petr Šmíd)

## La 1-a junulara E-renkontigo

En la tagoj 1. - 2. 4. 1989 okazis la 1-a junulara E-renkontigo de esperantista junularo de Nordbohemia regiono en Hřensko kaj Teplice. Partoprenis ankaŭ gastoj el Prago kaj du esperantistoj el GDR.

Entute 17 gejunuloj kune kun 2-jara Lucinka ekskursis el Hřensko al Pravčická brána, kie ili rigardis la belegajn rokojn de la Bohemia Svislando.

Dum renkontigo en Teplice oni estis informitaj pri la junulara sekcio de ĈEA, pri la konferenco de JS en Brno, pri preparataj balotoj por la nova estraro de JS. En paŭzoj ludis kvarmembra ensemblo, konsistanta el studentoj de gimnazio en Teplice.

La duan tagon atendis la partoprenantojn ekskurso al botanika ĝardeno de Tehníkaĵ servoj de la urbo Teplice kaj fine la gejunuloj havis

eblecon viziti banejojn de Fučik, kiujn restaŭris la itala firmo Feal en jaroj 1980-82.

La renkontigon preparis gejunuloj el Internacia Rondeto Amikeco - ZK Bonex, Teplice. (Jan Navrátil)



### JuSeTuR'89

Jam la trian fojon okazigis pragaj gejunuloj sian aranĝon JuSeTuR (Junularan Semajnfinan Turisman Renkontigon, 25.-28.5.1989), la unuan fojon sub nova auspicio de naturprotektita klubo Aqualica, kiu celas pere de Esperanto informi pri kaj komune protekti naturon. Same la unuan fojon bonvenigis nin belega suna vetero.

Bedaurinde zorgemaj organizantoj ne ekvidis ĉiujn, kiuj aliĝis kaj ne nuligis sian partoprenon (precipe ekz. 19 bulgaroj), kio kaŭzis kelkajn organizaĵajn kaj financajn problemojn. Plue krom kelkaj E-neparolantoj el Hungario aliaj malfacilaĵoj ne aperis. Entute partoprenis kaj gulis la internacian medion preskaŭ 80 alvenintoj el GDR, Hungario, Pollando, Ĉeĥoslovakio kaj FRG, de kie alveturis surbaze de sendeviza person-taga intersango 12-membra grupo de GEJ.

Por la partoprenantoj estis preparita ricega programo. Facilan orientigon certigis multaj prospektoj pri Prago kaj pri Ĉeĥoslovakio (tri el ili en Esperanto), kiujn ĉiuj tuj komence ricevis kune kun bildkartoj kaj insigno.

Vendrede la gastoj promenis tra la urbo eksciante sennombrajn historiajn vidindaĵojn de la ora Prago (la placojn Venceslaan kaj Malnovurban kun la astronomia horlogo, la Regan vojon, la belaĵojn de la Praga kastelo, malnovan hebrsan sinagogon kaj tombejon, la Karolan ponton kaj multon alian).

La 27-an, sabate oni konigis al si suda-orientan ĉirkaŭaĵon de Prago dum la tuttaga ekskurso al la kastelo Konopiště.

La unuan kaj lastan tagojn la interesitoj povis ĝui vidaĵojn de sur la monteto Petřín kaj de la Palaco de kulturo, kie ĈEA planas inaŭguran ceremonion okaze de (espereble) UK en la jaro 1992. Kelkaj utiligis la eblecon resti pli longe por travivi ankoraŭ pluaĵajn liberaĵajn tagojn en Prago.

Ĉiuvespere okazis senĝenaj amuzaj programoj, ĉefe ĉe bivakfajro. En la kvar tagoj estigis multaj novaj amikecoj kaj plifirmigis la malnovajn.

Dum la ekskursoj oni tagmangis en restoracioj kaj ofte laŭdis bongustajn ĉeĥajn specialaĵojn. Same la kuiristoj en la bonkvalita pionira kabanaro ĉe la valbaraĵo Praha-Hostivař, kie ĉiuj loĝis, ricevis de la ĉeestantoj apartan aplaudon.

La organizantoj kredas, ke la renkontigo plaĉis, kion fakte multaj esprimis per siaj dankoj, kontenteco kaj sopiro venontjare reveni. Permesu, ke ankaŭ ni danku al granda plejmulto, kiu kunkreis veran internacian etoson kaj aktive partoprenis pruvante konvenecon de la lingvo. Ni jam anticipe ĝojatendas revenon de la partoprenintoj kaj aliaj interesitoj denove fine de majo 1990 ĉe la kvara JuSeTuR.

(Vladimír Dvořák,  
prezidanto de JS ĈEA)

Internacia Junulara Esperanto-Seminario  
30. 3. - 4. 4. 89 en Bad Saarow/GDR

Inter la 30-a de marto kaj 4-a de aprilo 1989 okazis en Bad Saarow internacia Junulara Seminario, al kiu invitis la Junulara Komisiono de GDREA. Partoprenis 30 gejunuloj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Pollando kaj GDR, kiuj reprezentis 7 diversajn E-junularajn organizojn.

En diskutoj kaj prelegoj oni traktis la nunan situacion en la diverslandaj E-junularaj organizoj kaj la eblecon por pli efika kunlaboro sur diversaj kampoj.

Krome okazis prelegoj pri la nuna strukturo de la internacia Esperanto-movado, pri la uzado de Esperanto en scienco kaj tekniko, pri la vivo de Zamenhof, pri la verkado de poemoj en la internacia lingvo, pri DLT (Distribuita Lingvotradukado), pri E-instruado per amuzaj vortludoj ktp.

Memkompreneble ankaŭ ekzistis la ebleco por komuna kantado, arbarkurado, librovendado kaj urborigardo. Kulmino de la amuza programo estis la oratora konkurso.

Konklude la tagoj en Bad Saarow do vere kontribuis al plia firmigo de amikeco kaj kunlaboro inter la diversaj E-junularaj organizoj de la socialismaj landoj.

(Jens Merker, GDR)

# SOLENAĴO DE 20-JARIĜO DE SEA

La 7-an kaj 8-an de majo 1989 okazis en hotelo Esperanto en Příbram solenaĵo okaze de la 20-jariĝo de Slovaka Esperanto-Asocio. ĈEA estis reprezentita de la unua vicprezidanto Ing. Vlastimil Kočvara kaj la prezidanto de la paca sekcio de ĈEA s-ano Drahořir Kočvara.

Dimance vespere oni partoprenis kunsidon dediĉitan al lingvaj problemoj, lunde matene okazis regula plenkunsido de Centra Komitato de SEA, posttagmeze estis publika kunsido de CK de SEA. Ĉeestis naŭdeko da esperantistoj, plejparte el Ĉeĥio, ĉar samtempe okazis renkontigo de lernantoj de korespondaj kursoj aranĝataj de INKLEC.

La reprezentanto de ĈEA s-ano Vl. Kočvara salutis la kunvenon kaj transdonis jubilean medalon al SEA. En la publika kunveno elpasis s-ano D. Kočvara, kiel partoprenanto de la fonda kongreso de SEA en la jaro 1969. En la kadro de la kunveno estis kultura programo konsistanta el recitado kaj muzika prezentado (akordeono). (Lau -kov-)

## INVALIDOJ aktivas

La negranda urbo Slaný gastigis je la 9a, 10a kaj 11a de junio kelkdek esperantistojn, grandparte handikapitojn, kiuj havis sian seminarion. Ĝia temo estis fakte nur la unua renkonto kun "viva Esperanto", kun "viviaj esperantistoj". Ĉar kunigis partoprenantoj de la skrib-kursoj, kiuj neniam havis okazon aŭdi la prononcon de nia lingvo. Estas ege laŭdinde, ke ĉi renkontigo plenumis ankaŭ sian profundan propagandan celon, ĉar ne partoprenis nur la esperantistaro, sed ankaŭ oficialuloj el paca movado, el Nacia Fronto, el kultura fako, kaj ĉiuj kun miro aŭskultis, kiom da laboro por la nobla celo faris ni, esperantistoj, kaj tion preskaŭ nur "sur la genuoj", kiel diras la slogano. Oni promesis helpi al nia movado laŭ siaj ebloj, kaj same ni promesis laŭ ebloj niaj labori kaj agi por ke la paco estu en la mondo konservita, por ke la interkomprenigo en la mondo estu fakte efektiva.

Eble oni ne bezonas substreki, ke inter ni, partoprenantoj, regis la komprenigo kaj helpemo, kaj en granda amaso ankaŭ la bona humoro kaj humoro. Pro tio grandan DANKON ni diras al la organizantoj kaj al laboro de la sekcio de invalidoj ni deziras plenan sukceson en ĉiuj aferoj.

ĈEA dankas al la partoprenantoj, ke pere de la tombolo ili gajnis mon-sumon, kiun ili liveris al la Zamenhof-monumento en Frantiřkovy Lázně. (Ing. M. Turková)

Esperantistoj-invalidoj de ĈEA invitas al solena renkontigo omage al la 5-a datreveno de sia fondigo. La renkontigo okazos de la 8-a ĝis la 11-a de junio 1990 en Slaný, Ĉeĥoslovakio.

Informojn petu: Esperantistoj-invalidoj, P.K. 63, CS-274 01 Slaný, Ĉeĥoslovakio



# Rondeta vivo



**HAVÍŘOV** La prezidanto Zdeněk Heiser partoprenis en aprilo kun siaj kur-sanoj - lernantoj la arangon "Belsoneco de l' vorto" en Nová Dubnica en Slovakio. - La 20an de aprilo rakontis Jarmila Pastrnáková pri sia libertempo en Meksiko kaj si ankoraŭ rakontos pluajn fojojn pri aliaj travivaĵoj en tiu malproksima lando. Estis projekciataj diapoziti-voj, simile kiel la 25an de majo, kiam paroladis Zd. Heiser pri sia li-bertempo en la estona Tallinn kaj ĉirkaŭaĵo, kie lin gastigis lia plum-amiko. Ast.

**KLADNO** Honora aprezo por aktiva agado de la rondeto en la paca movado kun atribuo de la honora titolo "Interes-rondeto de esperantis-toj en Kladno - Pacdefendantoj" - estis transdonita al la estro de la rondeto, s-ano Jiří Slavík, dum la plena kunsido de la Distrikta Packon-silantaro, kiun partoprenis ankaŭ la gvidantoj de la Brigadoj de Socia-lisma Laboro portantaj honoran titolon "Paco". La kunsido estis arangita la 20-an de aprilo 1989 okaze de la 40-a datreveno de la fondigo de la monda kaj ĉeĥoslovakia pacmovado. - La Distrikta Packonsilantaro ankaŭ pritaksis ofereman laboron de la rondeto en la propagando de Kladno kaj de la distrikto per presmaterialoj por eksterlando kaj pri la edukado de la junularo en la 10-a fundamenta lernejo en Kladno. K.

**OLOMOUC** Jarkunveno de Esperanto-rondeto ĉe Parko de kulturo kaj ripozo en Olomouc okazis la 14an de marto 1989. Partoprenis ĝin 39 me-mbroj de la rondeto kaj gastoj. Ĉeestis ankaŭ reprezentantino de CK de ĈEA s-ano Jitřina Vondráková kaj delegitoj de Esperanto-klubo en Pře-rov kaj Prostějov. Komitato de la rondeto estis reelektita sen pli gran-daj ŝanĝoj. - La 28an de februaro 1989 prelegis al esperantistoj de Olo-mouc s-ano Jan Duda, membro de Moravia filharmonio, pri kulturmemoraĵoj kaj memorindaĵoj de Ateno. - Dum tri klubaj kunvenoj prelegis s-ano Ing. František Svoboda pri siaj vojagoj en okcidenta Eŭropo, nome la 21.3.89 pri vizito de Svedujo, Norvegujo, Danlando kaj de Germana Federacia Res-publiko, la 28.3.1989 pri vizito de Anglujo, Nederlando kaj Francujo, la 11.4.1989 pri vizito de Andoro, Monako kaj de itala Venecio. - La 26an de aprilo 1989 mortis longjara ano de Esperanto-klubo en Olomouc s-ano Marie Kubová, kiu pro siaj meritoj pri Esperanto-movado en Olo-mouc estis elektita kiel honora membro de la klubo. K+M

**OPAVA** Okaze de okdeka naskigdato de sinjorino Olga Horáková kunvenis la 16-an de majo gesamideanoj el Esperanto-rondeto en Opava por gratuli kaj festi tiun ĉi multsignifan jubileon de sia plej aĝa membri-no. Ĉ. Weishaupl



Membroj de la E-rondeto kiuj venis gratuli al s-ino O. Horáková

S-ino Olga Horáková kun s-ano ing. Vl. Kočvara ĉe tosto

**PLZEŇ** En tagoj 21a-23a de aprilo 1989 okazis en Kašperské Hory esperanta renkontigo, kiun organizis Esperanto-klubo Plzeň. Dank' al preparaj laboroj, kiujn oferece faris komitatanoj de nia klubo, ĉio estis perfekta. La kabano de "Průmyslový podnik", kiun sukcesis prizorgi nia prezidanto, estis lukse ekipita. Al nia dispono estis manĝejo, klubbejo, dusoj kaj cambroj po 2-4 litoj. Pri manĝaĵo zorgis modele unu nia klubano kun du kuiristoj. La vetero estis ne tro favora, sed felice ne pluvis, kaj ni do povis realigi planitajn ekskursojn al la burgo Kašperk, minista preĝejo sur tombejo kaj malnova muelilo por disdividi oron de teraĵo helpe de akvo. Vespere estis projekciitaj lumbildoj el Italio, Aŭstrio kaj Germanio, kantitaj esperantaj kantoj ktp. Neatendite ricegis nian programon s-anino Chylíková el Sušice, kiu parolis pri diversaj rimedoj por esti daŭre sana, parte temis pri jogo, parte pri uzo de akupresuro kaj pri makrobiotiko. Ĉiu aŭskultis kun granda koncentriĝo. La renkontigon partoprenis 23 homoj el Plzeň, Rokycany, Sušice, Strakonice, Praha kaj orientbohemia Zdelov. Zýk-Vom

Sukcesaj finintoj de korespondanta kurso de instruisto Ing. Vl. Kočvara:

Ludmila Pánková, Koněvova 548, 473 01 Nový Bor  
Renáta Křivdová, Gottwaldova 1094, 757 01 Valašské Meziříčí  
Jaromír Šolta, Sumperská 172, 500 02 Hradec Králové  
Mária Balková, Jalšovík 72, 962 41 Bzovík  
Miroslava Herynková, Čaková 23, 793 16 Zátor

Sincerajn bondezirojn al ĉiuj!

## Aperta letero al legantoj de "STARTO"

En STARTO, n-ro 2/89, paĝoj 19-20, publikigis s-ano Staňura en sia artikolo asertojn, kiuj mencias min persone kaj ne guste. Li asertas: "Vane mi sercis la nomon de Jiří Karen kaj Josef Rumler en Ilustrovaný encyklopedický slovník (Ilustrita enciklopedia vortaro), aperinta en la jaroj 1980-82, kiam ambaŭ poetoj estis jam ĉirkaŭ 60-jaraj. Ankaŭ la verko de Petr Bílek "175 autorů" (175 aŭtoroj) el la jaro 1982 ne konas tiujn nomojn. Detektivaĵoj, infanlibroj, de vere famaj ĉeĥaj aŭtoroj aperadas ec en 120.000 ekzempleroj, sed la poemaro de J. Karen "Stromy přicházejí do města" (Arboj marŝas urben) estis eldonita en 830 ekzempleroj. En la magazino "Kviz" mi legis, ke en la mondo estas ĉirkaŭ 10 milionoj da esperantistoj, do proksimume tiom, kiom da ĉeĥoj."

Jes, sinjoro Staňura pravas, asertante, ke li ne trovis niajn nomojn en la vortaro el jaroj 1980-1982. Sed, konate, ke la mondo sangigas kaj kiu sercas, trovas. En la nova enciklopedio, nome: Malgranda ĉeĥoslovaka enciklopedio, Academia 1984-1987, eldonis: Enciklopedia instituto de Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj, kreita per kolektivo de aŭtoroj de la Enciklopedia instituto, kies estro estas Bohumil Kvasil (Josef Říman) kaj la scienca redaktoro estas Miroslav Štěpánek, en la parto 3/I-L, pg. 318 legeblas: "Jiří Karen, naskigis la 1920-06-11, propranome Ladislav Podmele, ĉeĥa poeto. Lia poezio disvastigas tra larga temskalo (travivaĵoj militaj, ampoezio lirika, natur- kaj filozofia refleksio). Tipa estas kompakta esprimovo, kiu proksimiĝas al la esprimado proza (en "Vteřiny zrání" - Sekundoj de la maturigo, "Ještě jednou žít na zemi" - Ankoraŭunufoje vivi, "Hledání modrého tonu" - Serĉado de la blua tono)."

"Josef Rumler, naskigis la 1922-07-20, ĉeĥa poeto, literatura kritikisto, tradukisto el la pola literaturo, editoro de la klasika literaturo. En versoj li bildigas la pejzagon de la hejmlando ("Vynášení houslí" - Elportado de la violono), samkiel la nuntempan vivon. En la literatura historio li okupigas pri la verkado de Jaroslav Havlíček." (Tiu ĉi recenzo estas legebla en la parto 5, pg. 412-413).

Mi publikigis mian unuan poezi-libron en la jaro 1972. Estas necese scii tiujn faktojn pri miaj eldonitaj libroj:

Titolo	Eldonejo	Jaro de eld.	Ekzempleroj
Sekundoj de la maturigo	Práce	1972	700
Flugilhava ŝtono	Blok	1973	700
Kontraŭpluvmantelo	Mladá fronta	1976	800
Tagoj afablaj je vortoj	Melantrich	1976	1500
Ankoraŭ unufoje vivi	Kruh	1979	960
Serĉado de la blua tono	Melantrich	1979	1200
Lando tra kiu mi iris	Panorama	1983	3000

Titolo	Eldonejo	Jaro de eld.	Ekzempleroj
Bevor die neunte Welle	bibliofilio	1980	300
Arboj marŝas urben	Kruh	1984	830
Mi vetas por la homo	Melantrich	1986	1200
Via planko - nia plafono	Ĉs.spisovatel	1988	1000
Kvadrato super hipotenuzo de la amo	Melantrich	1989	3000
Flugilhava stono (en Esperanto)	Fonto	1985	500

Ĝis hodiaŭ, ekde la jaro 1972, mi eldonis 12 poezi-librojn, en la eldonkvanto 15690 ekzempleroj. S. Stanura sajnigas, ke miaj libroj eble ne valoras, se oni eldonadas ilin en tiom malgranda kvanto de 830 ekzempleroj. Kial? Nescio? Konscie?

Kiu mem verkas kaj eldonadas poezi-librojn, scias tion, kion scias mem A. Stanura. Li skribas: "Kiuŝ satas legi la esperantan poezion? Kiom da ili ekzistas en la mondo?" Se la aŭtoro de la artikolo tion cion scias, do povas esti nur lia malico, se li montras mian "senvaloron verkistan", citante la statistikon pri miaj eldonitaj libroj. Jes, ankaŭ en la ĉeĥa malfacilas eldoni kaj disvendi la poezi-librojn! Ĉu do mi publikigis tiom malmulte, koncerne la fakton, ke "nur malmultaj legas la poezion"? La publiko eble ne scias, ke la eldonejo malprofitas, se ĝi eldonadas la poezion. Ĉiu eldonejo malprofitas cirkau 40.000 kronojn, eldonante unu libron de la poezio. Pro tio la kvanto de eldonitaj libroj ne dependas de la valoro verkista, sed ĝenerale de inklinado eldonadi la poezion. Ĉu iu povas miri, ke la plej malgranda eldonejo, kaj tio estas la eldonejo Kruh en Hradec Králové, eldonadas miajn librojn en la eldonkvanto ĉ. 960, 830 ekzempleroj? La eldonejo havas malmulte da papero. Ne kompareble malpli ol grandaj pragaj eldonejoj. Sed kiu povas investi en la poezion, kiu havas sufiĉe da rimedoj, tiu eldonas miajn verkojn en kvanto de 3000 ekzempleroj.

Revenante al la libro "175 aŭtoroj" oni devas scii, ke ĉi tie estas menciitaj nur tiuj aŭtoroj, kiuj publikigas ĉe la eldonejo "Ĉeĥoslovenský spisovatel". Kaj tie mi ja publikigis en la jaro 1988, do ses jarojn post supre presita enciklopedio. Se opinii objekte, dum 17 jaroj publikigi 12 poeziajn librojn - tio en nia lando signifas pri la valoro - ne pri malvaloro de la verkado. Demandu aliajn! Same demandu (almenaŭ vin mem!), ĉu estas komparebla eldono de la poezio kun la eldonado de la detektivaj, infanaj kaj simile "popolaj" libroj... Por ne resti en la sfero de subjektiva opinio (nek la mia, nek la via) mi substrekas mian eldiron per la fakto: la sendube "fama" verko "Máj" (Majo) de K. H. Mácha estis eldonita en la kvanto 500 ekzempleroj!

Fine: Ĉi tie mi diris nur faktojn pri la mia, kaj de J. Rumler, verkado. Ne decas ĉi tie "memlaŭdi" nian verkadon. La objektivajn rimarkojn pri ĝi faris la fakuloj - do literaturaj kritikistoj. Mi nur povas ĉi tie menci la librojn, kie estas skribite pri ni ambaŭ: "Čeští spisovatelé 20. století" (la ĉeĥaj verkistoj de la 20a jarcento), pĝ. 262-264; "Slovník české literatury 1970-1981" (la vortaro de la ĉeĥa literaturo 1970-1981), pĝ. 163-164. Ambaŭ estis eldonitaj en la prestiĝa el-

donejo "Ĉeĥoslovanský spisovatel" (La Ĉeĥoslovaka verkisto) en la jaro 1985. Neniam mi parolus pri tio, se s-ano Stanura intence ne strebis malhonorigi nin ambaŭ! Liaj asertoj en ĉi partoj estas jam sentaŭge kaj sendece malproksimigitaj de la "disputado" pri neologismoj, kaj aliaj lingvaj problemoj. Ĉu malhonorigo estas nura "argumentado" inter ĉeĥaj kontraŭuloj de la "lingva batalo"?!

Jiří Karen, majo 1989

## Al la sinjoro Jiří Patera, respondeca redaktoro de Starto

En la dua numero de Starto sur la pagoj 19-20 vi publikigis la artikolon fare de sinjoro Stanura, en kiu la aŭtoro en tre nekutima maniero atakas la verkistinon Eli Urbanová, membron de la Esperanto-Akademio, kaj la ĉeĥajn verkistojn Jiří Karen kaj Josef Rumler. Pri E. Urbanová li asertas, ke ŝiaj vortoj pri la kunlaboro de la akademiano Henri Vatré, aŭtoro de Neologisma Glosaro, kun Prof. G. Waringhien, ĉefredaktoro de Plena Ilustrita Vortaro, "estas evidente neveraj". Ĉiu, kiu havis la Neologisman Glosaron en manoj, povis sur la p. 4 legi, ke Prof. G. Waringhien "amike disponigis, jam en manuskripto, la naŭpagan Glosaron de la tria eldono de la Parnasa Gvidlibro, donis utilajn informojn, konsilojn kaj kuragigojn". El tio evidentas, ke s. Stanura la Neologisman Glosaron de Vatré neniam eĉ vidis kaj malgraŭ tio li havas kuragon pri ĝi skribi. Alie li devus klinigi antaŭ la respektinda verko de H. Vatré, kiu en la Glosaro krom la verkoj de Kalocsay, Waringhien, Auld ktp. registras novajn vortojn ankaŭ el la verkoj de ĉeĥaj aŭtoroj - esperantistoj, kiel Pumpr, fratoj Filip, Kořínek, Vána kaj pliaj. Kvankam tiu ĉi nekono estas sekvo de la skribinto de la artikolo, de s. Stanura, tio ne senkulpigas la respondecan redaktoron, kiu havas devon, ĉiun daton antaŭe verifi, speciale kiam temas pri la honoro de Eli Urbanová. En la plua parto s. Stanura intencas lau la simile ofenda konduto kaj ignoro de la faka literaturo malpurigi la prestigon kaj la honoron de J. Karen kaj J. Rumler kiel de ĉeĥaj verkistoj, anoj de la Asocio de ĉeĥaj verkistoj, Suficus enrigardi en la leksikonon Čeští spisovatelé 20. století (Ĉeĥaj verkistoj de la 20a jarcento), eld. Ĉs. spisovatel 1985, kie pri J. Karen skribas la literatura sciencisto Štěpán Vlašín kaj pri J. Rumler la literatura sciencisto Milan Blahynka. Ni petas vin, sinjoro respondeca redaktoro, ke vi kiel satisfakcion represu en la esp. traduko tiujn ĉi ambaŭ artikolojn. El la faka literaturo ni plu mencias la artikolojn pri J. Karen kaj J. Rumler en Slovník české literatury 1970-1981 (Leksikono de ĉeĥa literaturo 1970-1981), kiun preparis la kolektivo de laboruloj de Instituto pri la ĉeĥa kaj monda literaturoj ĉe la Ĉeĥoslovaka akademio de sciencoj. Sinjoro Stanura kaj la ceteraj de li infektitaj dubuloj povas ankaŭ enrigardi la duan eldonon de Ilustrita enciklopedia vortaro. S-ro Stanura ne konante, ignorante la faktojn kaj malsatante la opiniojn de niaj ĉeĥaj verkistoj-beletristoj kaj samtempe esperantistoj, publikantaj en la eminentaj Esperantaj revuoj, per siaj asertoj damaĝas la bonan reputacion de la ĉeĥaj verkistoj. Ni petas vin, sinjoro responde-

ca redaktoro, ke vi konatigu kun la de ni enkondukitaj indicoj, ke vi korektu vian starpunkton, kiu kaŭzis la senorientigon de la legintoj, kaj ke sur la pagoj de la proksima numero de Starto en senkulpiga artikolo vi enkonduku la aferon en ordon.

Josef Rumler, Eli Urbanová

### Deklaro de la respondeca redaktoro de Starto

La artikolo de la prezidanto de la lingva komisiono de ĈEA s-ano Staňura en la 2-a ci-jara numero de Starto (pg. 19-20) enhavas asertojn, kiuj povas esti komprenataj kiel intenca senvalorigo de la reputacio de ĉeňaj kaj Esperantaj poetoj Jiří Karen kaj Josef Rumler antaŭ la ĉeňaj kaj internacia esperantistaro. Mia kulpo estas en tio, ke mi kiel respondeca redaktoro ne konsciis plene la gravecon de tiuj asertoj, mi sub-taksis ilin kaj permesis aperigi la artikolon sen necesaj korektoj kaj kompletigoj. Neniel mi intencis malutili al niaj poetoj Jiří Karen kaj Josef Rumler, neniel mi volis malgrandigi iliajn meritojn en la artiliteratura aktiveco, neniel mi emis senvalorigi ilian reputacion ĉu enlandan, ĉu internacian.

Pro tio mi nun aperigis la apertan leteron de Jiří Karen al legantoj de Starto, pro tio mi envicigis ankaŭ la leteron de Josef Rumler, adresitan al mi. La du leteroj enhavas multajn faktojn, kiuj korektas la asertojn de s-ano Staňura kaj ebligas al la legantoj de Starto trovi la gustan orientigon en la vero pri la ampleksa kaj impona literatura verkararo ĉeĥlingva de niaj samideanoj - Esperantaj poetoj J. Karen kaj J. Rumler.

Ĉi tie mi volas rimarkigi, ke en Starto (n-ro 2/1986, pg. 16) mi jam informis pri la leksikono "Ĉeňaj verkistoj de la 20-a jarcento" kaj pri la ĝojiga fakto, ke troviĝas en ĝi artikoloj pri niaj ĉeňaj/Esperantaj poetoj J. Karen kaj J. Rumler. Plue mi aldonu, ke en Slovník české literatury 1970-1981 (Leksikono de la ĉeňaj literaturo 1970-1981), eldonita de Ĉs. spisovatel 1985, troviĝas artikolo pri J. Karen sur p. 163 kaj pri J. Rumler sur p. 300. En la ĵus eldonita "Malgranda ĉeĥoslovaka enciklopedio" troviĝas artikolo pri Jiří Karen en la III-a volumo, pg. 318, kaj pri Josef Rumler en la V-a volumo, pg. 412.

La poemaroj de Jiří Karen renkontis ĉiam pozitivan akcepton kaj ĉe legantaro, kaj ĉe la literatura kritiko. La recenzoj pri liaj poemaroj povus formi jam apartan libron kaj en ĝi troviĝus kontribuadoj de tiaj kritikistoj kiel O. Rafaj, B. Kopic, S. Vlašín, L. Vacina kaj aliaj. Por kelkaj poemaroj li ricevis apartajn premiojn, ekz. por "Ankoraŭfoje vivi sur la tero" en 1977, "Antaŭ ol batos la nava ondo" en 1977, "Sercado de blua tono" en 1979, aŭ lastatempe por la poemkolekto "Via planko, nia plafono" - premion de la Ĉeňaj Literatura Fonduso en la nuna jaro.

Pri la verkararo de Josef Rumler eblas konstati, ke ĝi eniris lernolibrojn. Ekz. en la valora libro de Jiří Levý "Umění překladu" (La arto de traduko, Panorama Praha 1983) troviĝas kelkloke aludoj pri tradukaj solvoj fare de J. Rumler. Same en Lernolibro de stilistiko de Josef Hu-báček (SPN 1987) troviĝas analizo de poemo de Josef Rumler.

Per tiuj ĉi kelkaj - tute nekompletaĵ - konstatoj mi volis montri la gravecon de la verkaro de ambaŭ niaj Esperantaj literaturistoj, purigi ilian famon ĉe la esperantistaro kaj peti ilian pardonon pro la tute neintencita malagrablaĵo.

Jiří Patera,  
respondeca redaktoro  
de Starto

### Redaktora sciigo

La estraro de ĈEA okupigis pri la evoluo de la diskuto koncernanta neologismojn, la broŝuron "Abunde kaj redunde" kaj la studon de akademiisto Eli Urbanová "Lingva evoluo kaj beletra praktiko" en Starto n-ro 6/1988, kaj esprimis aproton al mi, kiel respondeca redaktoro de Starto.

Mi proponis fini la diskutadon kaj ne aperigi pliajn materialojn pri tiu ĉi temo, ĉar per ili mi nur senutile foruzus pagojn de Starto. Tio koncernas ankaŭ ampleksan 14-paĝan studon de akademiisto Bernard Golden "Eraraj tezoj pri lingva evoluo kaj beletra praktiko". Mi opinias, ke estos pli sage spari la pagojn de Starto por aliaj pli utilaj aferoj. Samtempe mi proponis ne aperigi la artikolojn pri la poetoj Jiří Karen kaj Josef Rumlér el la leksikono "Ĉeĥaj verkistoj de la 20a jarcento", ĉar temas pri ampleksaj tekstoj, por kiuj mi devus foruzi pliajn 6 - 8 pagojn de Starto. Ankaŭ tion la estraro de ĈEA aprobis.

Samtempe mi finas ankaŭ la diskutadon inter B. Golden kaj J. Mařík pri la graveco de "Verda Stacio". Estas vere, ke la tradicio "ne satigas", sed samtempe ni ne devas forgesi pri nia historio kaj ni devas klopodi tiri el ĝi instruon por venontaj tempoj. Espereble la Esperantlingvaj radiodissendoj en nia lando ne estas tute sensancaj, precipe se okazos UK en nia lando...

Fine mi dankas al ĉiuj legantoj de Starto, kiuj per siaj korespondadoj esprimis siajn aprobajn aŭ kritikajn opiniojn pri Starto kaj mi estos tre kontenta, se la alfluo de korespondadoj ankoraŭ kreskos.

Jiří Patera

### Esperanto-ekspozicio en České Budějovice.

En la Sudbohemia muzeo en České Budějovice estis la 16-an de junio inaŭgurita ekspozicio "Mondo sen interpretantoj", okaze de la 20-jara jubileo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La ekspozicion malfermis laborantino de la Sudbohemia muzeo ing. Kadlecová. Sekvis mallonga ĉeĥa-esperanta kultura programo, kiun partoprenis ankaŭ Sudbohemia kankoro. La ekspozicion trarigardis la unuaj gastoj, inter kiuj estis ne nur lokaj esperantistoj, sed ankaŭ samideanoj el Pollando kaj FRG kaj ankaŭ la prezidanto de ĈEA s-ano Ing. P. Chrdle. Pri la ekspozicio informis sabate la 17-an de junio 1989 ĉiuj centraj ĵurnaloj. Ekz. en Rudé právo oni skribis: "Mondo sen interpretantoj estas la titolo de ekspozicio en Ĉ. Budějovice, preparita al la 20a datreveno de ĈEA. La internacia lingvo ekzistas jam pli ol cent jarcjn kaj estis rekonita eĉ de UNESKO kiel rimedo por pli bona interkomprenigado kaj disvastigado de informoj en la tutmonda skalo." La ekspozicio daŭris ĝis la 10-a de septembro 1989.

Iomete el la verda pripensado  
por esperantistoj

Ing. JUDr. Miroslav Tůma, CSc.

Ĉiuj esperantistoj havas komunan revon pri la fina venko de nia movado, pri la oficialigo de nia lingvo. Forpasis jam pli ol cent jaroj de la aperigo de la unua lernolibro kaj oni povas denove nur diskuti, ĉu nia movado estis sukcesa aŭ ne. Sendube, ĝi ankoraŭ ne trovis sian ĉionpotencan kaj ĉionpovantan imperiestron, Napoleón, kiel en la tempo post la Granda franca revolucio nia metra sistemo. Nenian oficialigon oni povas realigi sen ia necesa potenco.

Do, kie estis eraro, manko aŭ malavantaĝo de la tuta projekto aŭ praktiko de nia movado? Kun certeco oni povas nur konstati, ke tute ne sufiĉas nur doni al komuna tuthomara dispono tre perfektan projekton de la internacia artefarita lingvo Esperanto,

- 1/ kiu, kiel aposteriora lingvo garantias prononcecon;
- 2/ kiu estas absolute fonetika;
- 3/ kiu havas senesceptan regulan akcenton;
- 4/ kiu havas skeman kaj severe regulan gramatikon;
- 5/ kiu multnombrigas sian vortprovizon per regulaĵaj sufiksoj kaj prefiksoj aŭ per vortkunmetado;
- 6/ kiu havas eblecon seninhibicie transprenadi vortradikojn el mortaj kaj vivantaj lingvoj de la tuta mondo;
- 7/ kiu por la kompareble egala nivelo de la scipovo bezonas nur dekonon de labortempo, kiu estas necesa por ellerni ian alian nacian naturan alfabetan lingvon.

Kial estas rezultoj de la disvastigado tiel modestaj? Ĉu pro tio, ke oni devas ĝin malgraŭ ĉiuj ĝiaj avantaĝoj lerni? Aŭ oni atendas ĝis aparatoj direktitaj per komputiloj transprenos ĉion eĉ la pensadon anstataŭ homoj? Aŭ ĉu la ideo de la praktika universala interkompreno por ĉiuj nacioj dum digna paco, senmilita laboro kaj reciproka respektado estas por kaj inter la homoj falsa kaj nereala? Kaj finfine ĉu la malbonuloj, malsaguloj kaj ŝovinismaj maltolere- muloj esprimas kaj reprezentas pli fidelan tuthomaran karakteron?

Ĉi tiuj kaj similaj pensoj atakadas oftege ĉiun esperantiston. Nur la espero en bonaj homaj ecoj donadas al la esperantistaro ĉiam denove novan forton por la nobla celo - praktika interkomprenado dum ĉiutaga laboro. Oni povas paroli pri la venka sukceso, ke la movado post cent jaroj ĉi tie ekzistas kaj ĉiutage pruvadas sian vivkapablecon.

Ni esperantistoj devas esti realistoj kaj devas akcepti krudan veron, kiu al ni diras, ke nia lingvo ne povas atendi ian miraklon, sed ĝi devas laŭvice traŭri sekvantajn stupojn de sia evoluo:

- 1/ Ĝi devas pruvi, ke ĝi estas plene kapabla teknike majstri situa- cion, kiel internacia interkomprenilo;
- 2/ Ĝi devas utiligi por unuopaj kaj poste por ĉiuj grupoj de homoj;
- 3/ Ĝi devas necesigi laŭvice por ĉiuj homoj.



## al 1/ Kapableco esti interkomprenilo

Esperanto jam pruvis, ke ĝi estas teknike kapabla majstri situacion dum UEA-kongresoj, okazintaj dum la pacaj epokoj ĉiujare eĉ kun ses mil ceestantoj. Ĉio okazis sen tradukistoj, sen superteknikaj auskultiloj kaj en bona volo.

En la muzeo en Vieno kuŝas libroj kun pli ol dudek mil titoloj. Kiom da libroj kuŝas ankoraŭ en tabloj de aŭtoroj atendante monajn rimedojn por esti eldonitaj.

La estonteco de nia lingvo dependas nun de la finkonstruado de la teknika kaj scienca terminaro. Ĉi tiu plej grava kaj urga tasko bezonas rapidan realigon kun la helpo de komputila tekniko sub la gvido de superaj movadaj kaj lingvaj institucioj. Nia Lingva Akademio devas senkondiĉe starigi en unuajn vicojn de ĉi tiu vivgravega afero.

Ja, la teknika kaj scienca lingvo de la tuta homaro bezonas pli larĝan vortaron, kiun oni ankoraŭ ne scias imagi. La nombro de vortoj kaj terminoj superos kelkfoje ĉiun konatan nombron de nuntempaj mondlingvoj - vivantaj kaj mortaj. Ĉiuj lingvoj servos kiel naturaj terminaraj vortradikaj provizejoj. Se Esperanto volas venki, ĝi devas okupi pozicion de plenrajta heredanto, sed neniam de uzurpanto.

## al 2/ Utileco de nia lingvo

Esperanto jam antaŭ longe komencis esti utila por diversaj kolektantoj, saminteresuloj kaj kompreneble por internaj kontaktoj inter anoj de Esperanta movado.

Ĉiu sentas, ke tio ne sufiĉas, ke necesas ĝisnunan evoluon akceli. Oni devas superi indiferencon de la teknikistoj kaj sciencistoj de la realaj sciencoj, montri neekonomian malsparemon de informa sistemo, kiu uzas komplikan tradukadon kaj precipe rompi oftegan malsimpation de profesiaj lingvistoj.

Nia atentemo devas esti unuaviĉe orientata al la lingvistoj, ĉar ili multfoje tute ne konantaj eĉ fundamentajn principojn de la interlingvistiko entute kaj de nia Esperanto precipe, kondutas ĉiuj veraj fakuloj. Ili plej ofte nur pro sia nescio kaj pli malofte pro sia malbona volo kaŭzas terurajn damaĝojn kaj malutilojn por nia movado.

Kial? Eble, ĉar ili en profundo de sia animo hontas, ke tiel gravan problemon de la praktika interkompreno ĝis nun plej bone solvis kuracisto kaj ne iu lingvisto - fakulo. Eble ili timas, ke ili perdos sian laboron kaj panon.

Sur la lingvosciencia tereno nia movado devas pli energie akcenti, ke ni ne volas forigi naciajn lingvojn. Ĉi tiun intencon havis nur diversaj grand- kaj bedaŭrinde ankaŭ malgrandnacionoj. Ni esperantistoj amas siajn proprajn gepatrajn lingvojn, respektante samtempe ceterajn lingvojn, ĉar en ĉiu nacia lingvo, vivanta aŭ jam morta estas ia peco de la homa kultura beleco. Ni estas profunde konvinkitaj, ke estas necese lerni tiun fremdan lingvon, en kies lando oni volas longtempe labori, se oni volas sian laboron plenumi perfekte. Tute ne gravas, ĉu la nacio estas granda aŭ ne.

Antaŭ la esperantistaro estas nun granda ebleco malfermi per nia lingvo laŭvice ĉiujn lingvojn por ĉiuj. Nuna situacio estas mal-

ĝojiga. Se oni volas aŭ devas lerni ian lingvon, precipe la lingvon de malgrandaĵoj aŭ tiel nomataj ekzotikaj nacioj, do oni preskaŭ certe ne trovas lernolibron, vortaron kaj gramatikon. Ekzemple longtempe ne ekzistis slovaka lernolibro de la hungara lingvo /tio ne estas ridebla, sed bedaŭrinde vero/. Ne ekzistas taŭga ĉeĥa normale vendata lernolibro kaj vortaro por la lingvo de la plej granda nacio sur nia mondo /ĉina lingvo/. En Sovetunio estas laŭdire pli ol 130 lingvoj, sed ne ekzistas ĉeĥa lernolibro de la ukraina lingvo /nacio kun 50 milionoj da homoj!/, pri aliaj ne estas necese paroli.

Se ni esperantistoj laŭvice kaj laŭplane konsistigus por niaj propraj gepatraj lingvoj lernolibrojn, gramatikojn kaj ambaŭflankajn vortarojn, memkompreneble kun necesaj gramatikaj rimarkoj je la nacia flanko, do estus pordego al la lernado de lingvoj por ĉiuj esperantigintaj nacioj larĝe malfermita. Oni povus lerni litovan, estonan, armenan, turkan, hindan aŭ ĉinan lingvojn. Samtempe ne estus problemo pretigi sonbendojn kun perfekta prononcado por denaskaj naciaĵoj.

La realigo de la vortaroj kun gramatikaj rimarkoj je la nacia flanko ne povas esti jam tiel multekosta. Ekzemple malnovaj ĉeĥaj germanaj vortaroj havis ambaŭflanke gramatikajn rimarkojn. Ili servis por ambaŭ nacioj. Nun ili havas ĉi tiujn rimarkojn nur je la germana flanko. Tio signifas, ke ili estas por germanoj ne nur senvaloraj, sed ankaŭ nevendeblaj. Ĉar ni ĉeĥaj esperantistoj estas tre sparemaj, ni intencas eldoni novan ĉeĥan esperantan vortaron sen gramatikaj rimarkoj je la ĉeĥa flanko. /Esperanta flanko de la vortaro ne bezonas iajn gramatikajn rimarkojn!/  
/

Oni povas supozi, ke esperantaj lernolibroj por nacia lingvo faritaj de denaskaj samlingvanoj povus esti tre perfektaj. Ĝi povus esti ankaŭ la plej bona vizitkarto de la kultureco de koncerna lando.

Se oni volus ankoraŭ iom pli multe paroli pri la ekonomio, do tiaj librovicoj /lernolibro, vortaro kaj gramatiko/ estus vendeblaj en ĉiuj altlernejoj filologiaj fakultatoj en la mondo.

La rezulto de ĉi tiu agado estus simpla - nia kara lingvo Esperanto estus utila, kaj por multaj lingvistoj eĉ necesa. Nia lingvo devas esti utila por nia socio. Eble por niaj pacdefendantoj. Ni povas al ili oferti facilan internacian lingvon, por ke ili povu paroli unu kun alia kaj ne nur mute rideti.

### al 3/ Neceseco de nia lingvo

En la tempo kiam nia lingvo komencos esti tutmonde necesa, tiam jam estos praktike decidite pri ĝia fina oficialigo.

Tiam finiĝos bedaŭrinde ankaŭ nia belega misio por la nobla ideo kaj ekmarŝos nova generacio kunigita precipe de lingvaj profesiuloj. Ni povas nur deziri, ke ankaŭ ili havu la verdan koron, kaj ke ili helpas konservi ĉiujn lingvojn, ĉar ĉi tie estas grandega riĉeco de la homa gento.

# ni pensu kaj agu realisme!

En la 2-a ci-jara numero de "Esperanto" mi legis tre pensigan artikolon de Thomas A. Goldman, redaktoro de Ekonomia Bulteno pri Usono, sub la titolo "La venko estas procedo, ne okazo". El la artikolo min precipe interesis jena konstato:

Esperanto jam estas sukcesa, sed la esperantistoj mem ankoraŭ ne konscias tion. La sekvo estas, ke ili ne uzas la lingvon tion, kiom ili povus kaj devus, ne utiligas ĝin por multaj celoj por kiuj ĝi ja bone taugus. - Kaj la aŭtoro klarigas tion jene:

"Mi vidas du gravajn kialojn por tiu manko de konscio pri la sukceso de la lingvo. Unu estas, ke oni komparas Esperanton kun la angla lingvo. Tio estas grava eraro. La angla lingvo estas mondlingvo. Esperanto estas internacia lingvo, kaj oni ne rajtas kompari unu kun la alia.

La alia kialo estas eĉ pli grava. Iam iu malbenita, kvankam bonintenca esperantisto elpensis la esprimon 'la fina venko'. De tiu tago esperantistoj fantazias pri la fina venko, kaj prokrastas ĉian utiligon de sia lingvo atendante tiun epifanion. Tial ili ne konstatas, ke Esperanto estas jam sukcesa en la rolo de internacia lingvo!

Ni do ne fantaziu plu pri malproksima tago kiam venos la fina venko. Ni ĉiuj devas kompreni, ke ni neniam vidos tiun tagon, kaj neniu vidos ĝin. Ĝi neniam venos. Ĉu iu vere kredas, ke iam ĉiu infano lernos Esperanton apud la gepatra lingvo? Neniu estas vere tiel freneza.

La venko ne estas unu grandioza evento, sed senfina sinsekvo de malgrandaj venkoj. Kiel matematika serio ĝi alproksimigas al limo, kiun ĝi neniam povas atingi. La venko estas procedo, ne okazo. Ni ne fantaziu plu pri ia fina venko, sed ni iru la vojon de sencesa venkado! Sencesa venkado signifas akcepti la fakton, ke Esperanto estas jam sukcesa en la rolo de internacia lingvo, kaj iri antaŭen de unu malgranda venko al la sekvonta.

Ni devas transiri de propagandado per vortoj al propagandado per agoj. Ni devas sencese kongresi, konferenci, prelegi, verki, eldoni kaj daurigi nian korespondadon, voĵagadon, babiladon. Ĉiu internacia konferenco, ĉiu nova libro, ĉiu numero de gazeto estas pli efika propagandilo ol cent flugfolioj aŭ informiloj."

Jen kelkaj ideoj, kiuj saĝnas al mi tre gravaj, el ampleksa artikolo de s-ano Goldman. Kaj mi gojas, ke similaj gravaj ideoj aperis ankau en nia Starto jam antau tri jaroj. Mia redakcia kolego s-ano Miroslav Malovec verkis artikolon, kiu aperis en Starto n-ro 4/1986 sub titolo "Utileco, ne venko". Tiam li konstatis, ke "la vorto kaj ideo 'venko' estas unu el la plej gravaj obstakloj por akceptigi Esperanton. Parolante pri la fina venko de la Lingvo Internacia ni fakte prezentas al la Publiko celon, kiu tute nature devas al la plejparto de neesperantistoj saĝni kiel nereala utopio. Se ni volas akiri la konfidon, respekton kaj precipe helpon de la publiko, ni devas prezenti al ĝi tiajn celojn, kiuj ankau al la neesperantistaro povas saĝni realigeblaj.

Esperanto ne progresas per promesplenaj fantazioj, sed per ĉiutaga

formika laboro de tiuj, kiuj ne multe cerbumas pri la fina venko, sed klopodas pri pli proksimaj celoj, kiel pri pretigo de vortaroj, lernolibroj, gazetoj, libroj, kursoj, seminarioj ktp.

Persvadi la publikon pri la fina venko de Esperanto ne havas senceon, car tia imago estas por tiu publiko nekredebla kaj nedigestebla. Sed ni povas konvinki ĝin, ke Esperanto estas kaj ciam restos utila lingvo, sen depende de tio, cu ĝi venkos aŭ ne. Ec se la angla kaj ceteraj mondlingvoj konservas sian cefan rolon en la internacia komunikado, ciam restos en la mondo centmilionoj da personoj, kiuj ne kapablos interkomprenigi per ili, car tiuj lingvoj estas tre malfacilaj. Esperanto do ciam havos sufican spacon por esti aplikata, eble nur kiel apuda, duaranga mondlingvo, sed fare de milionoj da homoj, kaj tia lingvo ja ne estas senbezona, ec se ĝi ne estos la plej grava. Anstataŭ dependigi Esperanton de ĝia venko, ni dependigu ĝin prefere de ĝia utileco, car tute ne estas certe, ke ĝi igos "dua patrolingvo por ĉiuj", sed estas certe, ke ec sen tio ĝi estos utila."

Jen, du artikoloj verkitaĵ ĉiu sur la alia flanko de la Terglobo, de du foraj esperantistoj, kiuj versajne ne konas unu la alian, sed kiuj penas prudente kaj realisme kaj kiuj sekve venis al la samaj konkludoj. Kaj al la samaj konkludoj versajne venis ankaŭ multaj aliaj samideanoj. Pripensu bone la supre notitajn ideojn, pridiskutu ilin en viaj kluboj kaj rondetoj kaj helpu realigi ilin.

Jiří Patera

Ĉu ni fine malkovros Amerikon - Simo Milojević - Esperanto n-ro 3/89

De la 30-a de novembro ĝis la 2-a de decembro 1988 okazis en la Kongresa Palaco de Havano (Kubo) la Konferenco "Esperanto 88"... La konferenco arigis iom pli ol 200 partoprenantojn, ĉefe el Kubo mem, sed venis dudeko da gastoj ankaŭ el Sud-Ameriko (Brazilo, Kolombio, Meksikio), el Francio, Hungario, Kanado, Koreio, Nederlando kaj Pollando...

Por ni eksterlandanoj la plej grava trajto de la Konferenco estis la grado de la atento kaj helpo, kiun ĝi ricevis de la ŝtataj aŭtoritatoj: la inauguron ceestis i.a. la estro de la Kultura Fako en la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo, unu el la vicministroj pri kulturo, kaj direktoro de la Fremdlingva Eldonejo. Tie kompreneble estis ankaŭ aro da ĵurnalistoj, televidaj, gazetaj, radiaj; la nacia posto honoris la Konferencon per specialaj stampo kaj koverto. Pri tia publika atento Esperantaj arangoj en la resto de la mondo apenaŭ povas revii. Aliflanke, tiu socia rekono al Esperanto estas pruvo pri la celtrafa agado de Kuba Esperanto-Asocio, kiu en sia laboro evidente ne flegas utopiajn verdismajn ideojn, sed sekvas la socian evoluon kaj sukcesas farigi parto de ili. Ekzistas movadanoj, aŭ ec landaj asocioj, kiuj konsiderus tian socian intergrigon esti la "perdo" de memstareco; mi tamen inklinas nomi ĝin trafa recepto de sukcesa landa agado por la internacia lingvo...

# ni recenzas

Jan Werner: **TERMINOLOGIA KURSO**. Eldonis la sciencetknika sekcio de ĈEA kaj Sdruženy Klub MOH, Roudnice nad Labem, 1986. Form. 15 x 21 cm, 88 p. Prazo 20 kronojn.

En nia movado oni ĉiam pli forte sentas, ke nuraj entuziasmo kaj amuzo /korespondado, turismo, beletro/ ne venkigos Esperanton, ĉar la homaro bezonas la internacian lingvon ne por sin distri, sed por internacie kunlabori, por komuniki gravajn ekonomiajn, sciencajn kaj teknikajn informojn inter unuopaj landoj. La gignunaj klopodoj apliki Esperanton en la fakaj sfero ĉiam fiaskis jam ĉe la sojlo pro simpla fakto, ke mankas taugaj terminoj. Montrigis, ke la natura evoluo, tiom sukcesa en la beletro, ne estas konvena por la faka stilo, kiu bezonas normigitajn kaj precize difinitajn fakvortojn - terminojn. Proponoj de multaj malkompetentaj personoj krei tiajn terminarojn klare vidigis, ke plenumado de terminologia laboro sen sufiĉa konatiĝo kun la problemaro povas la situacion nur komplikigi. Tial evidentigis, ke nia movado devas bazi sian fakon agadon sur lernolibro, kiu edukus esperantistojn-terminologojn.

La broŝuro de ing. Werner "Terminologia kurso" estas ĝuste prototipo de la atendata lernolibro, kiu kapablas enkonduki interesiton en la problemon, se li funde trastudos la verkon, ne nur supraĝe gin tralegos. Apogante sin sur la verkaro de la patro de la terminologio, prof. Eugeno Wüster, kiu estis ankaŭ eminenta esperantisto, kaj sur pluraĵ aliaj verkoj terminologiaj kaj lingvistikaj de diversaj aŭtoroj, ing. Werner kun maldiletanta precizeco arangis la libreton tiel sisteme, ke la studento pason post paso penetras en la terminologiajn principojn.

La verko estas dividita en dek partojn. La unua parto eksplikas la rolon de la terminoj en ĉiu lingvo. La dua parto prilumas la problemaron de nocioj, kaj la tria parto klarigas rilatojn, kiuj estas troveblaj inter nocioj apartenantaj al la sama nocio-sistemo. La kvara parto pristudas la terminojn, kiujn oni aljuĝas al unuopaj nocioj - kiajn kvalitojn la termino devas havi /sistemeco, stabileco, internacieco, precizeco ktp./. La kvina parto estas dediĉita al la kvin paŝoj al terminaro /limigi la fakon - determini la aron de nocioj - klasifiki la nociojn - difini la nociojn - nomumi la nociojn/. La sesa parto detale analizas la kreadon de terminoj en Esperanto, taksas la unuopajn manierojn de vortfarado /derivado, kunmetado, vortgrupigado, mallongigado, precizigado, elpruntado, metafora kaj metonimia transportado/. La sepa parto pritraktas diversajn specojn de vortaroj inkluzive de terminaroj. La oka parto donas informojn pri Internacia Normiga Organizo ISO kaj pri ĝiaj spertoj kun normiga kaj terminologia laboro sur internacia nivelo. En la naŭa parto la leganto trovos ekzemplon de serĉado de nova vorto kaj en la deka parto lingvistikan minimumon, ĉar ĉiu terminologo devas esti almenaŭ iomete ankaŭ lingvisto. La verkon kompletigas ankaŭ indekso de terminologiaj terminoj, glosaro kaj literaturo.

Por instigi la interesitojn al serioza studado de la lerno-libro, necesus organizi verajn terminologiajn kursojn, almenaŭ korespondajn, kaj ĉefe asociajn ekzamenojn pri terminologio, cetere kiel rekomendas tion ankaŭ ILEI /Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj/. Laŭ la propono de ILEI la bazaj Esperanto-kursoj devas finiĝi per A-ekzameno, poste oni trapasas B-ekzamenon, kiu similas al la ŝtataj ekzamenoj pri la mondlingvoj, kaj sur la plej alta ŝtupo staras C-ekzameno, kiu havas kvin specialaĵojn: instrukapablo, arttradukado, faktradukado, fremdulgvidado kaj komerckorespondado. Nia asocio ĉiujare arangas la ekzamenon "pri scio", kiu respondas al la B-ekzameno, kaj la ekzamenon "pri kapablo instrui" /C-ekzameno/. La verko de ing. Werner povas fariĝi bazo por la C-ekzameno pri faka laboro - sed tiun ekzamenon devus organizi ne la pedagogia, sed la scienteknika sekcio.

Miroslav Malovec

Petras Cvirka: KOKO KANTISTO KOKERIKISTO. El la litova tradukis Adomas Vaitilavičius, ilustris Taida Balšūnaitė. Eldonis Vyturyš, Vilnius, 1987, 10000 eks., 36 pg., formato 25,5 x 16 cm. Prezo 25 kopekojn.

El vorkaro de nelonga vivinta prozisto Petras Cvirka (1909 - 1947) elektis la tradukinto tri fabelojn, en kiuj agas nur bestoj kaj birdoj. La tekstoj estas bons legibla, grandlitere presita, facile komprenebla por infanoj de antaŭlerneja aĝo, kiel diras la rusa kolofono. Abundas rimoj en formo de poemetoj kaj ankaŭ en prozaj paroloj, kvankam oni trovas adasismojn, sed tiaj ekzistas eble en ĉiulingvaj infanaj paroloj. La tradukinto uzas formojn kiaj ursocjo, leporĉjo ks. Laŭ lingva vidpunkto oni povas nur minimumon riproci, kaj mi trovis nur unusolan preseraron. Oni povas eble nur pensi pri tio, ke la uzado de "ci" ne sonas bone al sperta esperantistaj oreloj. Jam Zamenhof en sia Fundamenta ekzercaro diras "vi" al hundo. La abundaj koloraj ilustraĵoj estas altnivelaj. Bona legaĵo ne nur por bone seperantigitaj infanoj, sed ankaŭ por ĉiujagaj komencantoj. Bedaurinde, ĉiuj tri fabeloj finiĝas nefeliĉe.

Adolf Staňura

#### La ekspozicio pri la Paco en Prago

Honore al la 40-a datreveno de la organizita pacmovado en Ĉeĥoslovakio okazis en Prago ekspozicio "La Paco estas Afero de Ĉiuj". La ekspozicion preparis la Ĉeĥoslovaka Pac-komitato kune kun la Ĉeĥa kaj Slovaka Pac-konsilantaroj.

La ekspozicio montris ĉiujn facetojn de la batalo por la paco kaj tial estas memkompreneble, ke unu vitrino en la ekspoziciejo estis dedicita ankaŭ al Esperanto kaj Mondpaca Esperanto-Movado.

En la kadro de la ekspozicio okazis ĉiutage prelegoj kaj diskutoj pri la problemoj de la konservo de paco. Marde la 4-an de julio la diskuto havis temon "Nova pensado - paco kaj senarmigo" kaj por tiu ĉi arango estis oficiale invitita la honora membro de ĈEA s-ano Draĥomir Kočvara, la multjara kaj sperta gvidanto de la paca sekcio de ĈEA kaj la membro de IK MEM.

La ekspozicio daŭris de la 7-a de junio ĝis la 9-a de julio 1989. (jp)

La 26-an de junio 1989 post peza malsano forpasis

s-ano Ing. Włodzimirz H e b d a el Albrechtice, en aĝo de 70 jaroj.

Ni kondolencas al lia familio.

# Esperanto en la radio



RADIO POLONIA elsendas el Varsovio ĉiutage ses duonhorajn programojn en Esperanto. Dum la vintra periodo vi povas auskulti ilin jene:

- 6.00 - 6.30 h - mallongaj ondoj: 31,01; 41,27; 50,04 m (9675, 7270, 5995 kHz), meza ondo: 200 m (1503 kHz)
- 12.00 - 12.25 h - mallongaj ondoj: 25,34; 31,50; 50,04 m (11840, 9525, 5995 kHz), meza ondo: 200 m (1503 kHz)
- 16.30 - 16.55 h - mallongaj ondoj: 25,39; 49,22 m (11815, 6095 kHz)
- 18.30 - 19.00 h - mallongaj ondoj: 31,45; 41,18; 48,90 m (9540, 7285, 6135 kHz)
- 21.30 - 21.55 h - mallongaj ondoj: 31,50; 41,99, 42,11 m (9525, 7145, 7125 kHz)
- 22.30 - 22.55 h - 41,18; 41,27; 42,11; 48,90; 49,22; 50,04 m (7285, 7270, 7125, 6135, 6095, 5995 kHz), meza ondo: 200 m (1503kHz).

Se vi volas ricevi novan presitan informilon, mendu ĝin ĉe la adreso:  
Radio Polonia. Esperanto-Redakcio. Varsovio. Pollando.

## Nova konkurso de RADIO POLONIA

La 1-an de septembro de la 1989-a jaro pasos la 50-a datreveno de la II-a mondmilito eksplodigita de la hitlera Germanujo, la mondmilito, kiu kaŭsis la morton de pli ol 50 milionoj da homoj.

Okaze de la datreveno RADIO POLONIA anoncas konkurson. Ni proponas du demandojn kaj la gusta respondo al almenaŭ unu demando rajtigas partopreni en la lotado de multaj objektaĵaj premioj. La konkursaĵajn respondojn ni petas elsendadi ĝis la 31-a de decembro de la 1989-a jaro. La anonco de la rezultoj de la konkurso okazos en ĉiuj elsendoj de RADIO POLONIA la 15-an de februaro de la 1990-a jaro.

Kaj jen la konkursaĵaj demandoj:

1. Kion vi scias pri la partopreno de la poloj en la II-a mondmilito?
2. Kion povas fari ĉiu el ni, kion povas kaj devas fari via ŝtato por ne allasi al nova mondmilito?

La konkursaĵojn oni sendu laŭ la adreso: RADIO POLONIA, Esperanto-Redakcio, OO-950 VARSOVIO, pk. 46, POLLANDO. Sur la koverto bonvolu aldoni la kromnoton "Konkurso".

Ni kore invitas auskulti la elsendojn de Radio Polonia, en kiuj vi trovos i.a. programojn ligitajn kun ĉi tiu temaro. Invitante al la partopreno ni samtempe informas, ke ĉiu partoprenanto de la konkurso, sendepende de la lotumado de la ĉefaj objektaĵaj premioj ricevos QSL-karton kun la motivo ligita kun la konkursa temo.

RADIO POLONIA

RADIO VIENNO elsendas en Esperanto ĉiudimanche de la 11.30 ĝis la 11.55 h sur mallongaj ondoj: 48,74; 21,85; 19,42; 13,96 m (6155, 13730, 15450, 21490 kHz) kaj de la 15.05 ĝis la 15.30 h sur mallongaj ondoj: 48,74; 21,85; 13,96 m (6155, 13730, 21490 kHz). Auskultu kaj skribu al: Radio Österreich International, ORF, Esperanto-redakcio, A-1136 WIEN, Aŭstrio.

# lingva angulo

## KIAMANIERE PAROLI FLUE

Ni ĉiuj jam multfoje spertis, ke eĉ lertaj esperantistoj dum parolo stumblētas kaj balbutetas, kio estigas nebonan, mispropagandan impreson je aŭskultanta neesperantista publiko. Foje mi eĉ legis kiel anekdoton, kiu efektive okazis, ke du esperantistoj interparolis en tramo, kaj iu apudstaranta sinjoro diris al sia amiko: "Ili parolas Esperanton." La amiko miris, kiel li rekonis tion. "Ĉar ili balbutas", estis la klarigo. Vere, laŭ balbutado la esperantistoj estas facile distingeblaj disde aliaj parolantoj. Necesas iomete analizi tiun malagrablan fakton kaj trovi vojon de rebonigo.

Parolante la gepatran lingvon, oni multajn sonojn "englutas", kio faciligas kaj rapidigas la parolon, kvankam malfaciligas la perceptadon, precipe flanke de la fremdlingvanoj. La plej fama "englutanto" estas la angla /sufiĉas kompari la anglan prononcon de kelkaj internaciaj vortoj kun la Esperantaj formoj: seknd = sekundo, tevrn = taverno, kesidrel = katedralo, mesed = metodo ktp./.. En la ĉena slango oni prononcas "esisisivšim" anstataŭ "jestli jsi si všimnul" /= se vi rimarkis/ aŭ "uš du" anstataŭ "už jdu" /= mi jam iras/. Komparante la elparolon de la duopo "jdu - du", eblas rimarki, ke la sono -j- larĝigas la buŝon, streĉas la vangajn muskolojn kaj longigas la silabon. La samon kauzas tiu sono en la Esperanta pluralo, precipe en kombino kun akuzativo /komparu: granda fabriko - grandaj fabrikoj - grandajn fabrikojn/. La Esperanta prononco estas klara, bone perceptebla, sed ĝi postulis malrapidan ritmon, pli malrapidan ol en la naciaj lingvoj. Ĉiu homo subkonŝcie tendencas paroli same rapide kiel en sia gepatra lingvo, sed ĉar tio ne eblas, facile okazas stumbloj, kies ripetado rezultigas kiel balbutado. Al tio aldoniĝas nesufiĉe vigla rememorado de taŭgaj vortoj, kaŭzanta paŭzojn pro embaraso, plenigatajn per ne tro inteligente impresanta sono "eeeh".

Kiu volas forigi tiun mankon, devas diligente trejni malrapidan parolon kun taŭgaj paŭzoj kaj dum la paŭzoj vere silenti. Estas pli bele kaj pli inteligente resti por momento muta ol elbuŝigi ian nekulturan murmuron. Dum la paŭzo oni povas rememori kaj pripensi vortojn, per kiuj eblas daŭrigi la parolon. En ĉiu frazo ekzistas grupoj da vortoj, kiujn oni elparolas komune kvazaŭ unu tutajojn, kaj inter tiuj grupoj necesas paŭzi, ne tro longe nek tro kurte. Ekzemple la frazon "hodiaŭ vespere mi venos vizite al vi por rigardi vian bebon" oni diras kun du paŭzoj: hodiaŭ vespere - mi venos vizite al vi - por rigardi vian bebon.

Mi mem konvinkigis, ke tiamaniere eblas paroli sufiĉe flue, bele kaj nature, sed flua parolo bezonas multan ekzercadon. Antaŭ publiko oni facile nervozigas, pensas nur pri la enhavo de dirajo, forgesas "bremsi", rapidas kaj balbutas.

Miroslav Malovec



---

---

# Efektive okazis

Josef Chvosta: Rememoro pri samideano František Pytloun  
kaj kontribuo al problemo de "nur: jen, teprv"

Samideano František Pytloun estis eminenta Esperantisto, kiu sciis ne nur bone Esperanton, sed li estis ankaŭ bona propagandanto de la lingvo kaj organizanto de la Esperanta movado. Li naskiĝis en 1891, ellernis Esperanton dum la unua mondmilito kaj estis fervora Esperantisto ekde la Universala kongreso en Praha. Lia profesio de fervoja oficisto ebligis al li vojagi kaj disvastigi ĉie sciadon pri la internacia lingvo. Samideano Pytloun havis la diplomon pri la instruado laŭ la rekta metodo /Ĉe-metodo/ kaj fondis multajn kursojn. Lia nomo aperis jam inter funkciuloj de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-asocio, kiun oni likvidis en 1952. Kaj ne nur antaŭ 1939, kiam la naziistoj malpermesis la internacian lingvon, sed ankaŭ post la renovigo en 1945. Pro sia profesio samideano Pytloun ofte ŝanĝis sian loĝlokon kaj fondis ĉie Esperantajn kursojn, klubojn kaj rondetojn. La profesio ebligis al li fari tion ne nur en la loĝloko, sed ankaŭ en ĉirkaŭaĵo. Tuj post la dua milito li loĝis en Hradec Králové. Estas lia merito, ke tie estas Zamenhof-strato, ke tie aperis "Granda vortaro" ĉeĥa-Esperanta kaj Esperanta ĉeĥa, kiuj estas uzataj ĝis nuna tempo kaj en la malfavora epoko por la internacia lingvo ili estis valoraĵoj en vendejoj kun antikvaj libroj. Post sia pensiuliĝo venis samideano Pytloun en Poděbrady kaj sukcesis tie en mallonga tempo fondi vigan Esperantan rondeton. Tio estis en 1954, kiam la malfavora situacio de la internacia lingvo komencis aliĝi kaj pliboniĝi. En postaj neregulaj kaj primitivaj informiloj de Esperantistoj komenciĝis aperi la nomo de Poděbrady, kiu tiam estis unuafoje, ĉar antaŭe ne estis Esperantistoj en Poděbrady. Samideano Pytloun estis aktiva ĝis sia morto, same aktivaj Esperantistoj estis ambaŭ liaj filoj kaj ambaŭ edzinoj. En Poděbrady estis samideano Pytloun grava aganto en la Esperanta movado, li gvidis perleteraĵajn kursojn por komencantoj kaj laboris ĝis sia morto en 1976. Li partoprenis multajn universalajn kongresojn, eĉ post la milito en 1945 li estis en Malmö, Svedio kaj laste en Budapeŝto, Hungario en 1966.

Iam samideano Pytloun rakontis epizodon el sia riĉa poresperanta agado. Eble li ne diris la nomon de la urbo, kie li tiam loĝis, sed li eltraktis tie tri prelegojn de alia eminenta Esperantisto, eble samideano Theodor Kilián el Třebíč. La prelegoj estis planataj por tri sinsekvaj tagoj: ĵaŭdo, vendredo, sabato. La prelegonto estis invitata veni pli frue, kompreneble samideano Pytloun estis gastiganto. Kaj li ricevis Esperantan telegramon: Mi venos nur ĵaŭde. Samideano Pytloun ektimis, li opiniis, ke la plano estas minacita. Li sukcesis iel sciigi la samideanon pri sia timo, ĉu la vendreda kaj sabata prelegoj okazos, ĉar en la telegramo ja estis: Mi venos nur ĵaŭde.

Kiam la prelegonta gasto eliris el la trajno kaj estis bonvenigata de samideano Pytloun, do li sciante pri la timo de samideano Pytloun diris ĉefe ridetante: "Teprv".



## ...el Pollando

Gekomencantoj el Pollando, kiuj lernas en agrikultura teknikumo, volas korespondi kaj amikiĝi kun germanaj gekolegoj: KATARZYNA PIECH, 63-436 CIESZYN, DOBRZEC 19, (16 jaroj) - moderna muziko, kino, libroj, vojaĝoj, modo

EWA MAWROCKA, 62-831 KORZENIEW, PRZYRANIE 67, (16 jaroj) - modo, muziko moderna, filatelo, vojaĝoj

EWA GEBUREK, 63-436 CIESZYN 100 (16 jaroj) desegnado, kino, bildkartoj  
ELŻBIETA MACIAK, 63-440 RASZKÓW, MOSZCZANKA 73, (17 jaroj) - sporto, turismo, moderna muziko, automobiloj, ĉevala veturo

JACEK STANIEK, ZESPÓŁ SZKÓŁ ROLNICZYCH, INTERNAT MYSKI, 63-421 PRYZGODZICE (20 jaroj) - m. muziko, turismo, libroj, automobiloj, mangado kaj dormado.

18-jara tajlorino volas korespondi: Barbara Walkowiak, 61-330 Włódek ul. Bankowa 12, Poznań 24, Pollando

35-jara laboratoristino de Sanitara-Epidemia Stacio interesigas pri literaturo, adreso: Genovefa Szymańska, ul. Mickiewicza 18/19, 22-500 Hrubieszów, Pollando

13-jara lernantino de la sesa klaso serĉas esperantiston el nia lando. Adreso: Alina Głowiak, 63-450 Sobótka 130, woj. kaliskie, Pollando

12-jara lernantino de la sesa klaso interesigas pri humoro, postmarkoj, satas legi librojn, serĉas esperantistojn el nia lando. Adreso: Anita Krzysztofiak, Zychlin 6, 63-324 Kuczków, Pollando

44-jara virino interesigas pri ĉio: Anna Szydło, Kraków 49, Al. Pokoju 33, skr. pocz. nr. 8, Pollando

26-jara instruistino interesigas pri turismo, fotografio, fremdaj lingvoj, kolektoj postkartojn/bildkartojn kaj postmarkojn. Adreso: Grażyna Maleszka, ul. Solna 7/57, 43-300 Bielsko-Biała, Poll.

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Karel FRANC, Jiří HANOUSEK (grafika arango), Ing. Vlastimil KOČVARA, Miroslav MALOVEC, Jiří PATERA (respondeca redaktoro) kaj Helena ŠTRUNGOVÁ. Presas Podnik služeb města Liberce. Transdonita al preseo 1989-07-31. Jarabono 36 CSK, por eksterlando 48 CSK aŭ 14 NLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turnu sin al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidebln vĉstník Ĉskského esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Karel FRANC, Jiří HANOUSEK (grafická úprava), Ing. Vlastimil KOČVARA, Miroslav MALOVEC, Jiří PATERA (odpovědný redaktor) a Helena ŠTRUNGOVÁ. Povoleno odborem kultury NVP č. 310006385 ze dne 18. 3. 1985. Tiskne Podnik služeb města Liberce. Předáno do tisku 31. 7. 1989. Dohlédací pošta Praha 07. Snižený poplatek za poštovné povolen Ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6. 4. 1979.

# ANEKDOTOJ

## 1. Sincereco:

- Karulo. ĉu vi denove edziĝus, se mi mortus? , demandis iu edzino sian edzon.
- Al tiu ĉi demando estas malfacile respondi!
- Kial?
- Se mi diros al vi, ke mi edziĝos, tio ne plaĉus al vi, sed se mi respondos ke ne, tio ne estos vero!

## 2. Grava paroldifekto:

- Nia nova sekretariino havas iun gravan paroldifekton.
- Kiun?
- Ŝi ne scias diri la vorteton "ne".

## 3. Pluvombrelo:

- Hieraŭ mi perdiĝ belan pluvombrelon.
- Ĉu vi mislokis ĝin ie?
- Ne, ĝia posedanto rekonis ĝin!

## 4. Ĉe la doktoro:

- Sinjoro doktoro, ĉu mi jam darfus trinki alkoholaĵon?
- Kial vi demandas min denove? Ja mi diris al vi jam hieraŭ, ke nek unu guton!
- Pardonu, sinjoro doktoro, mi opiniis, ke la medicina scienco iomete progresis depost hieraŭ!

## 5. Alta aĝo:

- Estas vere, onklo, ke vi estas 110-jara?
- Certe!
- Kiamaniere vi atingis tiun altan aĝon?
- Nu, mi havis paciencon!

## 6. Ĉe la doktoro:

- Sinjoro doktoro, kial vi tiel severe malpermesis kanti al tiu ĉi paciento?
- Ĉar li havas malbelan voĉon kaj loĝas en mia najbareco!

## 7. Ŝnuro sen hundo:

Iu fraŭlo promenis sur la tratuaro trenante malantaŭ si ŝnuron. Haltas lin iu pasanto kaj demandis lin:

- Kial vi trenas la ŝnuron malantaŭ vi sen hundo?
- Ĉu mi devu puŝi ĝin antaŭ mi?

## 8. Solvo de krucenigmo:

Jozefo solvas krucenigmon:

- Monika, kiu estas la futura tempo de la verbo "ami"?
- Edzinigi, respondas sen longe pripensu la fratino de Jozefo.  
El la hungera lingvo tradukis: Lad.Chmelik

**Český esperantský svaz  
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

**NOVINY**

**Dohlédací pošta Praha 07**  
**Snížený poštovní poplatek povolen**  
**Ředitelstvím pošt Praha**  
**J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979**